

EL POPOLA
CINIO

1
1965



育



Dumonata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 1 (90) 1965

Ĉefa Enhavo

Sur la kovrilo — Antaŭ la Fornego
Pentris Ĝang ŝenĝi

Dorse de la fronta kovrilo — Unua
Plia Ŝtonolea Rafinejo

Foto de Liu Entaj

Kresko kun la Venko de Socialismo

Deklaro de Prezidanto Maŭ Zedong
por Subteni la Popolon de Kongolando
(Leopoldvil) kontraŭ Usona Agreso

La Laboristoj de Nova Ĉinio
Ĉinaj Laboristoj sur la Monda
Scienca Podio

Kiamaniere la Nova Ĉinio Eliminis
Senlaborecon

Mi Rejuniĝas

La Disvolviĝo de Ŝoseokonstruado
La Novaj Atingoj de Ĥirurgio en
Ĉinio

Tri Renkontoj kun la Rivalo

Inter Vendistoj kaj Klientoj

Ĉinaj Popolaj Ludoj dum la Prin-
tempa Festo

“Ruĝas la Oriento” — Eposo de
Muziko kaj Danco

La Turisma Vivo de la Ŝanhajanoj
“La Fajreroj en Fragmitejoj” (Pekina
Opero)

Lampolumoj

Rakonto pri Dormo

Ginggang-monto Hodiaŭ

Eksterordinara Batalo en la Or-
dinara Vivo (Sur Pekina Scenejo)

Veĵcio (Ĉina Ŝako)

La Pekina Internacia Tablotenis-
Invita Turniro

Post la Kurso

Sur Nia Librobreto

Esperanto Marŝas

Korespondi Deziras

Inter Ni

Distra Angulo

Dorse de la dorskovrilo — Kun Bezo-
naĵoj al la Lignoproduktejo

Foto de Hu Vej

Sur la dorskovrilo — Montoj kaj
Arboj en Ruĝo

Pentris Li Kejan



KRESKO KUN LA VENKO DE SOCIALISMO

Lastjare ni celebris la 15-an jaron de nia popola respubliko kaj nun ni celebras la 15-an jaron de la iniciatiĝo de nia gazeto.

De la ok-paĝa iom mizera gazeto en 1950 ĝis la nuna kvardek-paĝa preskaŭ luksa kajero, de la limigita enhavo nur en kelkaj artikoloj ĝis la nuna kun ampleksaj, riĉaj materialoj kaj multaj interesaj rubrikoj en unu numero, de la unuaj kelkcent legantoj ĝis la nuna grandamasa legantaro, nia gazeto ja sufiĉe multe progresis. Tio estas senprecedenca en la historio de la ĉina E-movado.

Tio ne estas hazarda, ĉar ja grandpaŝe progresis la socialisma konstruado de nia popola respubliko. Kvankam la imperiistoj mult-maniere nin blokadas kaj okazis al ni maloftaj naturaj katasstrofoj kaj aliaj malfacilaĵoj, nia socialisma konstruado trovis sian vojon al sukceso. Nun jam neniu dubas, ke Ĉinio suriris la vojon al modernaj industrio, agrokulturo, scienco, kulturo kaj nacia defendo.

Kreskas nia popola respubliko, kaj kreskas ankaŭ nia esperanta laboro.

Tio rememorigas al ni multon.

Por aplikado de Esperanto en la interrilato kun diversaj popoloj por akceli la interkomprenon precipe inter la ĉina kaj alilandaj popoloj, la ĉinaj esperantistoj multe klopodis jam ekde la 30-aj jaroj. Malnovaj amikoj de Ĉinio eble ankoraŭ memoras multajn ĉinajn esperantajn periodaĵojn kiel ekzemple “Ĉinio Hurlas”, “Voĉoj el Oriento”, “Heroldo de Ĉinio”, “La Ĵurnalisto” k. s. Ĉiuj tiuj periodaĵoj sin dediĉis al la sama celo.

Sed en la malnova Ĉinio regata de la imperiistaj lakeoj kaj feŭdaj fortoj, tia entrepreno ne prosperis. La eldonoj estis sen-garantiaj, la eldonantoj kaj ankaŭ la redaktoroj estis persekutataj kaj iuj el ili estis eĉ mortigitaj. Tiuj gazetoj do povis vegeti nur iom da tempo kaj fine malaperis.

La fondiĝo de la popola respubliko en 1949 alportis al la tuta ĉina popolo, inkluzive ankaŭ la ĉinajn esperantistojn, tute novan medion. Ĉia timo estas forigita. Ĉies kapablo trovas taŭgajn kampojn. Ĉio utila kaj bona estas utiligata por la bono de la popolo. Nia gazeto naskiĝis ĝuste en tia medio. Laŭ la tradicio de ĉinaj esperantaj laboroj ĝi informas al la tutmonda esperantistaro la realan bataladon kaj vivon de la ĉina popolo, kaj per tio servas al socialismo, al la interkompreno de la popoloj kaj al la vera monda paco.

Kiel oni vidas, ke antaŭ 15 jaroj ni semis la etan semon de okpaĝa informilo en nia patrio ĵus liberiĝinta, kaj nun ĝi disfloras en la ĉiam pli granda prospero de la socialisma konstruado en nia lando. Por tio ankaŭ niaj karaj legantoj multe kontribuas. La nuna tasko nia estas ĝin kulturi por pli sana kresko.

De 15-jara knabo oni atendas baldaŭan tute maturan homon. Ni do atendu la maturecon ankaŭ de nia same juna gazeto. Kaj tion garantias la kreskanta socialisma konstruado en nia lando kaj la kunlaborado de la esperantistoj en la tuta mondo.

La Red.

DEKLARO DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG

por Subteni la Popolon de Kongolando (Leopoldvil) kontraŭ Usona Agreso

La armita agreso de la usona imperiismo kontraŭ Kongolando (Leopoldvil) estas tre grava afero.

Jam delonge Usono intencas meti Kongolandon sub sian kontrolon. Utiligante la UNO-trupojn ĝi faris tie ĉiajn malbonaĵojn: ĝi murdis Lumumba, la nacian heroon de Kongolando; ĝi renversis la laŭleĝan registaron de tiu lando; ĝi trudis la pupon Ĉombe al la popolo de Kongolando kaj ekspedis dungitajn trupojn por subpremi ĝian naci-liberigan movadon. Kaj nun, ĝi entreprenas rektan armitan intervenon al Kongolando en komploto kun Belgio kaj Britio. La celo de la usona imperiismo en tiu ĉi faro estas ne nur meti Kongolandon sub sian kontrolon, sed ankaŭ ĵeti denove la tutan Afrikon, precipe la nove sendependiĝintajn afrikajn landojn en la reton de la usona novkoloniismo. La agreso de Usono renkontis heroan reziston de la konga popolo kaj kaŭzis justan indignon de la popolo de Afriko kaj la tuta mondo.

La usona imperiismo estas la komuna malamiko de la tutmonda popolo. Ĝi agresas Sud-vjetnamion, intervenas al Laoso, minacas Kamboĝon kaj kriaĉas pri disvastigo de la milito en Hindoĉinio. Plenenergie ĝi klopodas sufoki la revolucion de Kubo. Ĝi deziras fari Okcidentan Germanion kaj Japanion ĝiaj du gravaj nukle-bazoj. Ĝi kreas kune kun

Britio la t. n. Malajsion por minaci Indonezion kaj la landojn en Sudorienta Azio. Ĝi okupas Sudan Koreion kaj la ĉinan provincon Tajvan. Ĝi superregas la tutan Latinamerikon sub sian kontrolon. Ĉie ĝi tiranas kaj despotas. La manoj de la usona imperiismo etendiĝis tro malproksimen. Tamen en agreso al ĉiu plia loko, ĝi metis unu plian maŝon ĉirkaŭ sian kolon. Ĝi jam falis en multtavolan sieĝon de la popolo tra la tuta mondo.

En sia justa batalo, la popolo de Kongolando ne estas izolita. Vin subtenas la ĉina popolo. Vin subtenas la tuta kontraŭimperiisma popolo tra la tuta mondo. La usona imperiismo kaj la reakciularoj de ĉiuj landoj estas papertigroj. Tion pruvis la batalo de la ĉina popolo. Tion pruvas la batalo de la vjetnama popolo. Kaj tion pruvas ankaŭ la batalo de la popolo de Kongolando. Pli-fortigante la solidarecon de sia nacio kaj persistante en longdaŭra batalo, certe venkos la popolo de Kongolando kaj certe malvenkos la usona imperiismo.

La popolo de la tuta mondo unuiĝu kaj venku la usonan imperiismon kaj ĉiujn ĝiajn lakeojn! La popolo de la tuta mondo estu kuraĝa, kuraĝu batali, ne timu malfacilojn, marŝu antaŭen unuj post aliaj; do, la mondo apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj estos likviditaj.

LA ĈINA POPOLO SUBTENAS KONGOLANDON (LEOPOLDVIL) KONTRAŬ USON-BELGIA AGRESO

En la 19-a de nov., 1964, la usonaj imperiistoj formetis sian maskon de post-kulisa direktanto kaj faris grandskalan atakon al Stanlejvil de Kongolando kaj faris sangan buĉadon al la popolamasoj en komploto kun la belgaj imperiistoj. Tio kaŭzis indignon kaj proteston de la ĉina popolo. En la kvin tagoj de la 29-a, nov. ĝis la 3-a, dec. en la tuta lando viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj maljunulinoj, gejunuloj, laborantoj de diversaj okupoj, religiuloj kaj dommastrinoj ktp., sume 8,000,000 personoj, iris sur la stratojn

kaj okazigis grandajn manifestaciojn kaj mitingojn. Sole la 29-an de nov., en Pekino estis 700,000 personoj kiuj partoprenis en la mitingo kaj manifestacio. La gvidantoj de la Partio kaj Registaro, k-doĵ Maŭ Zedong, Liu Ŝaŭki, Ĝou Enlaj, Ĝu De, Deng Hiaŭping kaj tiuj de multaj aliaj politikaj partioj kaj amasaj organizoj ĉiuj persone ĉeestis tiun mitingon. Cetere partoprenis ĝin ankaŭ eksterlandaj gastoj en Pekino kiuj sin nombris je pli ol 1,800 personoj. La nombro de la manifestaciantoj en sinsekvaj tri tagoj en Pekino atingis pli ol 2,200,000 personojn. Ankaŭ en la aliaj grandaj urboj de Ĉinio okazis popolamasaj manifestacioj kun indigno kaj laŭtaj sloganoj: "Firma subteno al la popolo de Kongolando en ĝia justa batalo!", "Kontraŭ la agreso de la usonaj kaj belgaj

imperiistoj!" En Ŝanhajo, Tiangin, Kanton k. a. sume dek urbegoj, de kelkcent mil ĝis super miliono da indignantaj protestantoj surstratiĝis por riproĉi la usonajn agresantojn, kaj esprimi firman subtenadon de la ĉina popolo al la kongolandanoj en ilia justa batalo.

USONA REKOGNOSKA AEROPLANO FALIGITA EN ĈINIO

La 15-an de novembro, 1964, unu senpilota altaera rekognoska militaeroplano de Usono invadis la aeran teritorion de mezsuda Ĉinio kaj estis faligita de aera trupo de la Ĉina Liberiga Armeo. En la sekvinta tago, Marŝalo Lin Biaŭ, ministro de nacidefendo, sendis specialan dekretan al la dirita trupo por ĝin premii.

LA LABORISTOJ DE NOVA ĈINIO

VANG GIAJANG

ĈEFO DE LA PRODUKTA DEPARTEMENTO
DE LA TUTĈINIA FEDERACIO DE SINDIKATOJ

EN la jaro 1949, kiam la unua kvinstela ruĝa standardo de nova Ĉinio leviĝis super la Ĉielpaca Placo en Pekino, la imperiistoj asertis ke en la kuranta jarcento la ĉinaj laboristoj neniel povos restarigi kaj mastrumi sian industrion, por ne paroli pri ĝia disvolvo.

Sed, kio okazis fakte?

Novaj fabrikoj kaj minejoj estas konstruitaj unuj post aliaj, kaj aroj post aroj da modernaj maŝinoj, aŭtomobiloj kaj aeroplanoj estas elfabrikitaj. Tiun brilan sukceson la ĉinaj laboristoj akiris per siaj propraj manoj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio.

Nun, Ĉinio jam mem projektis kaj konstruis multe da modernaj entreprenoj, inkluzive de ferŝtala uzino kaj karbominejo kun po jarprodukto de milionaj tunoj, hidroelektra centralo kun kapacito de 650,000 kilovatoj, kemisterka fabriko kun jarprodukto de 100,000 tunoj da nitrosterko, oleo-rafinejo kapabla rafini ĉiujare milionajn tunojn da nafto. La ĉinaj laboristoj jam elfabrikis altklasajn, grandtipajn, precizajn kaj modernajn

ilmaŝinojn, altfornegojn, Martin-fornegojn, 12,000-tunan hidraŭlikan premilon por forĝado kaj ankaŭ aliajn ekipaĵojn kompletajn kaj grandtipajn por minekspluatado, hidroelektro-produktado kaj fabrikado de sinteza amoniakaĵo.

Dum la periodo de la Unua kaj Dua Kvinjaraj Planoj, la nombro de la komplete aŭ parte finkonstruitaj grandaj kaj mezgrandaj industriaj entreprenoj projektitaj kaj ekipitaj de Ĉinio mem atingis jam 1446. Multaj novaj industribranĉoj rapide stariĝis dum la lastaj jaroj rezulte de la praktikado de la politiko "konstrui socialismon sin apogante sur siaj propraj fortoj". Ĉina industrio faris grandan salton en plialtigo de la kvalito kaj pliigo de la kvanto kaj specoj de fabrikaĵoj.


La ĉina laboristaro jam unuapaŝe establis sian sendependan kaj firman fundamenton de industrio.

TEKNIKA RENOVIGO

La ĉinaj laboristoj faris ĉion eblan por sin

Fu Hajkjuan, laboristo de la Vuhi-a Fabriko de Dizelaj Pumpiloj kaj Bekoj montras al siaj kolegoj kaj vizitantoj la teknikon de altrapida larĝa tranĉado.






Ni Ĝifu (maldekstre la unua) montras al laboristoj stan novan borilon.

teknikistoj de pli ol cent fabrikoj malgrandaj kaj mezgrandaj en Ŝanhajo kunlaboris sin organizinte en kelkcent fakaj grupoj, provis fojon post fojo, kaj sukcesis ĉion pretigi por la moderna fabriko grandtipa en mallonga tempo. Krome, la projektado, konstruado kaj maŝin-instalado de la nomita fabriko ĉio ĉi estas plenumita de Ĉinio mem.

La ĉinaj laboristoj senĉese renovigas kaj plibonigas la malnovajn ekipaĵojn. Ni prenu kiel ekzemplon la Fabrikon de Industria kaj Trafikaj Iloj en Ŝanhajo. Ĝi estas malgranda kun mizeraj ekipaĵoj, el kiuj ĉirkaŭ 90% estas instalitaj antaŭ 20-30 jaroj. Mankas al ĝi modernaj ilmaŝinoj por plenumi la taskon produkti lagrojn. Dank' al kelkdek fojoj da provoj, veterana laboristo Fu Ĵenfa kaj aliaj sukcesis reformi malnovajn ilmaŝinojn, kaj prilabori per ili la internon de la lagroj. Ili faris ankaŭ aliajn 25 teknikajn plibonigojn kaj finfine elfabrikis lagrojn same bonkvalitajn kiel tiuj produktitaj de la moderna kaj grandtipa Unua-Aŭtofabriko.

Por akumuli pli multe da kapitalo de socialisma konstruado, la ĉinaj laboristoj mastumas siajn entreprenojn diligente kaj ŝpareme. Ili faras ĉion eblan por malaltigi la produktokoston, preventi ĉiajn malŝparojn kaj ŝpari diversajn krudaĵojn, materialojn kaj instrumentojn.



Laboristoj en la Kikihar-a Dua Ilmaŝina Uzino komparas la atingojn de la laborgrupoj.

levi el la postrestinteco en tekniko kaj konkeri diversajn malfacilojn en produktado.

Teknikajn kunlaborojn iniciatis labormodeloj kaj progresintaj laboristoj de Liaŭning-provinco en 1963. Multaj gravaj demandoj en produktado estas solvitaj dank' al koncentrigo de teknikaj fortoj kaj reciproka helpo. Tiu kunlaborado nun jam disvolviĝas tra la tuta lando kun centmiloj da partoprenantoj.

Por fabriki la kompletan ekipaĵon por la Ŝanhaja Vuging-kemifabriko kun jarprodukto de 100,000 tunoj da nitrosterko, la laboristoj kaj

NOVTIPA LABORKONKURSO

La ĉinaj laboristoj nun disvolvas entuziasme kun alta politika konsciiĝo socialisman laborkonkurson sub la devizo "Komparu, lernu, kuratingu kaj helpu", t. e., ke oni sin komparu kun la antaŭirantaj laboristoj kaj unuoj, lernu de la progresintaj ideologio kaj labormetodoj, klopodu por kuratingi la avangardajn nivelojn kaj helpu al la postiĝintoj.

Tiu novtipa konkurso fariĝis jam amasmovado kun tutlanda skalo ekde 1963, kaj ĝi organiziĝis ne nur interne de la entreprenoj sed ankaŭ inter

diversaj entreprenoj, eĉ inter diversaj lokoj. En 1963, lernaj grupoj kun 22,000 personoj el diversaj industriobranĉoj kaj metioj de multaj provincoj kaj urboj veturis al Ŝanhajo, la avangarda kaj plej granda industria urbo en Ĉinio, de kie ili lernis 40,000 progresintajn labormetodojn. Ankaŭ Ŝanhajo sendis pli ol 6,000 personojn al la alilokaj

entreprenoj por lernado. Krome, okazis multaj kunvenoj por interŝanĝi spertojn en produktado.

La ĉinaj laboristoj, kiuj estas fariĝintaj mastroj de sia lando, jam fondis bazon por la modernigo de industrio per siaj saĝo kaj laboremo, kaj, sur tiu bazo, nun ili daŭre marŝas antaŭen kun firma volo strebi al la potencoĝo de sia patrolando.



Interŝanĝo de spertoj pri fadena kunligo inter ŝanhajaj kaj Hingiang-aj ŝpinistinoj.



Haŭ Gianhiu (meze), labormodelo de la lando interkonsiliĝas kun teknikistoj kiel plibonigi la teknologian projekton de dikfadena ŝpinado.

ĈINAJ LABORISTOJ SUR LA MONDA SCIENCA PODIO

HINHUA

EN aŭgusto 1964, en Pekino okazis la Pekina Scienca Simpozio kun partopreno de 367 sciencistoj el kvar kontinentoj, nome: Azio, Afriko, Oceanio kaj Latinameriko. En tiu simpozio du ĉinaj laboristoj laŭtlegis siajn disertaĵojn, kiuj ĝuis altan takson de la sciencistoj.

Tio, ke du ĉinaj laboristoj surpaŝis mondan sciencan podion, estas senprecedenca afero en la ĉina scienca historio. Unu el tiuj du laboristoj estas Tang Ingbin el la ŝipkonstruejo "Giangnan" de Ŝanhajo kaj la alia — Ni Ĝifu el la Unua Ilmaŝina Fabriko de Pekino. Antaŭ nur kelkaj jaroj ili promociiĝis de ordinara laboristoj al inĝenieroj.

La temo de la disertaĵo de Ni Ĝifu estas "La Borilo Elpensita de Ni Ĝifu". Antaŭ la Liberiĝo, li ricevis nur trijaran elementan edukadon kaj estis devigata labori en fabriko en la 12-jara aĝo kiel infano-laboristo. Ĉe la fondiĝo de la nova Ĉinio li estis nur 16-jara. Kiam li kreis sian novtipan borilon, li estis ankoraŭ 20-jara duagrada stabllaboristo. Ankaŭ Tang Ingbin, kiu estas 48-jara, lernis antaŭ la Liberiĝo malpli ol tri jarojn. Ĝuste tiu ĉi ordinara laboristo fabrikis la unuan ĉinan 12,000-tunan "tute lutitan" hidraŭlikan premilon kune kun siaj kolegoj. La disertaĵo pri la lutmetodo de tiu hidraŭlika premilo estis entuziasme aklamita en la Pekina Scienca Simpozio kiel verko atinginta la internacian sciencan nivelon.

Kial la du ordinara laboristoj, kiuj antaŭe estis kulture tre malaltnivelaj, povas surpaŝi la mondan sciencan podion? Tiuvespere kiam ili prezentis siajn disertaĵojn, mi ilin vizitis.

Kiam mi vidis ilin, tiuj du laboristo-inĝenieroj ankoraŭ estis en forta ekscitiĝo kaj diris: "En la malnova socio nia hodiaŭa travivaĵo estis neimagebla por ni, laboristoj, eĉ en la sonĝo."

En la malnova Ĉinio la lutista laboro estis nur por flik-riparado, eĉ la ordinara lutbastoneto devis esti importitaj el eksterlando. En tiu tempo oni ne povis trovi tra la tuta lando eĉ unu profesoron aŭ specialiston, kiu speciale studis lutteknikon. Nur post la fondiĝo de la nova Ĉinio luttekniko ekludis gravan rolon en la maŝinfabriko industrio. En 1958, laŭ la politiko de sinapogo sur siaj propraj fortoj la Popola Registaro elmetis la taskon fabrikigi 10,000-tunan hidraŭlikan premilon per progresinta lutmetodo — "elektro-skoria luto". Laborinte kiel lutisto dum pli ol dudek jaroj Tang Ingbin depost tiam komencis sian sciencan esplorlaboron. Sekve de la naskiĝo de 10,000-tuna hidraŭlika premilo elkreskis ankaŭ multaj specialistoj pri "elektro-skoria luto". Unu el ili estas Tang Ingbin. Tang Ingbin diris: "Mia propra sperto pravas, ke nur post kiam la popolo ekposedis la regnopotencon kaj komenciĝis la socialisma konstruado en granda skalo, ni laboristoj povas plene disvolvi nian saĝon."

Ĉi tie ni denove iom parolu pri la estiĝo de la disertaĵo pri la borilo elpensita de Ni Ĝifu. En la komenco la borilo povis prilabori nur ŝtal-aĵojn. Poste, Ni Ĝifu vizitis siajn kolegojn en plejparto de Ĉinio, adoptis iliajn spertojn, faris studadon, kaj finfine sukcesis apliki tiuspecan borilon en la prilaborado de gisaĵoj, kupro, alu-

Ni Ĝifu kaj teknikistoj kunstudas kiel pliperfektigi la drilojn.





Tang Jingbin legas sian disertajon pri elektra skoria lutado en la Pekina Scienca Simpozio.

minio kaj aliaj metaloidaj materialoj. En la komenco, li nur sciis, ke tiuspeca borilo estas oportuna por la uzado, kaj ĝi povas plialtigi la produktivon, tamen li ne povis klarigi la aferon teorie. Multaj inĝenieroj, sciencaj esplorantoj kaj instruistoj de alternejoj fervore lin helpis en la analizado kaj esplorado. Docento Ju Kihjun, estas unu el liaj kunlaborantoj dum longa tempo, kiu kunlaboris kun Ni Ĝifu en verkado de la di-

sertaĵo “La Borilo Elpensita de Ni Ĝifu”. Nur dank’ al tio, oni povis fari teorian esploron pri la borilo de Ni Ĝifu.

La atingoj de Tang Ingbin kaj Ni Ĝifu signifas, ke jam komenciĝis la epoko, kiam la ĉina laboristaro sin suprenturnas en la scienco! Ili decidis pluapase plialtigi sian sciencoteknikan nivelon kaj fari pli grandan kontribuon por la afero de la socialisma konstruado de Ĉinio.

Kiamaniere la Nova Ĉinio Eliminis Senlaborecon

DE MU

POST la establiĝo de la nova Ĉinio, la vorto “senlaboreco” fariĝas ĉiam pli malofte aŭdebla. La popola registaro klopodis ĉiamaniere solvi la problemon de senlaboreco postlasita de la malnova Ĉinio. En la komenca periodo post la establiĝo de la nova Ĉinio, pri la laboristoj kaj oficistoj en la ŝtataj oficejoj de la malnova Ĉinio kaj burokratkapitalaj entreprenoj, la registaro alprenis la politikon “transpreni la tuton”, donis al ili konvenajn laborojn kaj vivrimedojn ke ili ne senlaboriĝu. Samtempe, per trejnado kaj varbado k. a. enoficigis milionon da senlaboraj intelektuloj postlasitaj de la malnova Ĉinio.

En junio de 1950, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ la centra popola registaro komencis aktive registri, helpi kaj enoficigi la senlaborulojn en ĉiuj grandaj urboj. Amasoj da senlaboruloj enoficiĝis unuj post aliaj. En 1958, dank’ al la totala antaŭensaltego de la socialisma konstruado kaj la establiĝo de la popolaj komunumoj en la kamparo, la pli ol kvar milionoj da senla-

boruloj postlasitaj de la malnova Ĉinio ĉiuj jam ricevis laborojn. Tiutempe, ankaŭ granda amaso da dommastrinoj liberiĝis de la domlaboroj kaj partoprenis en diversaj laboroj de la socialisma konstruado.

Tio signifas, ke post la establiĝo de la nova Ĉinio, dum la mallonga periodo de naŭ jaroj de 1950 ĝis 1958, la problemo de senlaboreco en unu granda lando kun pli ol 600 milionoj da loĝantoj estis radikale eliminata.

La fundamenta metodo de la nova Ĉinio por solvi la problemon de senlaboreco estas disvolvi la produktadon kaj enoficigi la senlaborulojn laŭ la bezono de la produktado. Antaŭ ilia enoficiĝo unue estis alprenitaj ĉiaj rimedoj por solvi la vivproblemon de la senlaboruloj kaj eduki ilin ellerni certan produktoteknikon por enoficiĝo. Sube estas la ĉefaj metodoj por konkrete solvi la problemon de senlaboreco.

Unue, pere de la labordepartemento rekomendi la senlaborulojn al enoficiĝo, aŭ kuraĝigi ilin mem enoficiĝi. En la naŭ jaroj, pere de rekomendo de la popola registaro,

la enoficiĝintaj senlaboruloj estis entute 2,740,000 kaj la senlaboruloj mem enoficiĝintaj pere de diversaj sociaj rilatoj estis pli ol 430,000.

Due, trejnadi por enoficigo. Pro la postĝinteco de la produktado, tekniko kaj kulturo de la malnova Ĉinio, granda parto de la senlaboruloj estis senteknikaj kaj malkleraj. Tial la diversgradaj popolaj registaroj starigis trejnkursojn de diversaj teknikaj fakoj kaj kulturo por unue ellernigi al la senlaboruloj teknikon, ilin klerigi kaj poste enoficigi. Antaŭ 1957, la partoprenintoj en la trejnado por enoficigo estis entute pli ol 210,000.

Trie, helpi per laborpago. Por helpi tiujn kiuj kapablis por fizika laboro kaj portempe ne povis enoficiĝi, la registaro organizis ilin por entrepreni urbokonstruajn laborojn, kaj ilin pagi por ilia laboro el la helpmono por senlaboreco. Dum la daŭro de la kvin jaroj de 1950 ĝis 1955, tiajn laborojn oni partoprenis je pli ol 3,620,000 personfojoj. Kune kun la plilarĝigo de la fundamenta konstrulaboro, la plejparto de ili jam fariĝis oficialaj laboristoj de la unuoj de fundamenta konstruado.

Kvare, sinhelpi per produktado. La registaro organizis la senlaborulojn kiuj posedis certajn produktoteknikojn sub la principo de memvolo por entrepreni diversajn produktadojn. La registaro ilin helpis solvi la problemon de kapitalo, kaj la tutaj enspezoj apartenis al ili mem. De 1950 ĝis 1955 en tiaj entreprenoj partoprenis 164,000 senlaboruloj. Sekve de la ŝtatigo aŭ kooperigo de tiuj entreprenoj ili jam fariĝis iliaj laboristoj aŭ oficistoj kaj havas konstantan okupon.

Kvine, organizi senlaborulojn per agrikultura produktado. Inter la urbaj senlaboruloj estis bankrotintaj kamparanoj urben enfluintaj antaŭ la Liberiĝo.

Post la agrara reformo vidante, ke la kamparana vivo pliboniĝis, ili postulis hejmenreveni por partopreni en la agrikultura produktado. Laŭ ilia postulo la popola registaro disdonis al ili manĝmonon, helpmonon por produktado kaj sendis ilin hejmen por partopreni en la agrikultura produktado. Reveninte vilaĝen, tiuj personoj akiris ankaŭ terkulturajn instrumentojn kaj pruntmonon por produktado disdonitajn de la registaro. Laŭ la statistiko, de 1950 ĝis 1956, tiaj senlaboruloj estis 250,000.

Al la senlaboruloj perdintaj laborkapablon kaj havantaj malfacilan vivon, la popola registaro laŭmonate aŭ laŭsezone liveradis monon aŭ objektojn por solvi la malfacilojn en ilia vivo. Nur de 1950 ĝis 1955, la ŝtato jam elspezis helpmonon de 83,000,000 juanoj, kaj oni ricevis tian helpon je 6,650,000 personfojoj.

Pri la enoficigo de la laborfortoj nove elkreskantaj ĉiujare, la registaro asignas al ili konvenajn laborojn laŭ la bezono de la konstruado kaj produktado kaj ilia propra volo. Oni tute ne bezonas maltrankviliĝi pro senlaboreco. En la dek kvin jaroj post la establiĝo de la nova Ĉinio, la diplomigintaj studentoj estas entute pli ol 1,300,000, kaj ili ĉiuj ricevis konvenajn laborojn. La plej fundamenta kaŭzo de tio, ke en la nova Ĉinio ne estas senlaboruloj, kaj en la pasinta mallonga tempo la fenomeno de senlaboreco postlasita de la malnova Ĉinio povis esti eliminata, estas ĉar en Ĉinio eliminiĝis la reĝimo de ekspluatado, kaj sekve eliminiĝis la socia kaŭzo de senlaboreco. Kaj krome la rapida kaj senĉesa disvolviĝo de la industrio, agrikulturo kaj la aliaj konstruadoj kreis la kondiĉojn por garantii la totalan enoficigon de la ĉiujare nove elkreskintaj laborfortoj.



Multaj dommastrinoj jam partoprenis en industria produktado.

Mi Rejuniĝas

GUO HJUĜEN, vicestrino de la Unuiĝo de Industriistoj
kaj Komercistoj de Ŝanhajo

Multaj el niaj amikoj interesiĝas pri tio, kiel vivas nun la pasintaj kapitalistoj de Ĉinio post la komenco de la socialisma revolucio. La jena artikolo respondos tiuteme al niaj legantoj. La Red.



TRI monatojn antaŭ la Liberigo de Ŝanhajo, mia patro transdonis al mi la administradon de la Huaĉang-a Aluminaj-fabriko malfacile irigata de li. Tiam mia penso estis tre komplika. Tiu fabriko estis fondita de mia patro ĝuste en la jaro 1916, en kiu ankaŭ mi naskiĝis, sekve mi havas intiman senton al ĝi. Ricevinte la administradon mi klopodis prosperigi la fabrikon kaj ne vanigi la konfidon de la patro, sed samtempe mi sentis ke tio estas nefacila. En la infanaĝo mi jam sciis ke el la samspecaj fabrikoj estas iu entrepreno de fremduloj, kies kapitalo estis ĉefe investita de usonanoj kaj superis tiun de ĉiuj samspecaj fabrikoj en la tiama Ŝanhajo. Ĝi ĉiam nin observadis kiel avida tigro kaj estis preta forgluti nian fabrikon en favora tempo. Mia patro ĉiam timis ke nia fabriko viktimiĝos sub ĝiaj ungegoj. Ĉu mi, virino neniam mastruminta entreprenon kaj sen kompetenta socia sperto, povus venki tian danĝeron? Tute necerta mi estis. Efektive, post la transpreno de la fabriko, mi povis fari nenion alian ol vizitadi bankojn, aĉeti kaj vendi valutorajtigilojn, interŝanĝi arĝentajn dolarojn per monbiletoj. Estis vere malfacile por mi elteni la senripozajn klopodadon.

La 28-an de majo 1949, kiam Ŝanhajo estis liberigita, forkuris la usonaj militŝipoj sur Huangpu-rivero. Estis ĝojinde por mi precipe tio ke la entrepreno de fremduloj ne plu povis nin minaci feroce. Sed tiutempe mi ankoraŭ ne konis la Kompartion kaj ne sciis kiel ĝi traktos la industriistojn kaj komercistojn, kaj kiajn tagojn ni havos. Mi sentis ke necerta sorto min atendas.

La sekvintaj faktoj pruvis, ke miaj zorgoj estis tute superflujaj. Ekzemple, taksite laŭ tiama merkato, la stokitaj kvadrataj aluminaj manĝaĵoj de nia fabriko povis esti elvenditaj post almenaŭ 5-6 jaroj. Tio kaŭzis al nia fabriko tre grandan malfacilaĵon. Neatendite, la ŝtata komerca kompanio sendis al nia fabriko por enketi nian produktaĵon. Informiĝinte pri la granda stoko da kvadrataj manĝaĵoj ĝi tuj kontraktis kun nia fabriko kaj foraĉetis la tutan stokon en kelkaj monatoj. Tio solvis al ni la mankon de cirkula kapitalo kaj faris al mi tre profundan impreson. Mi komencis kompreni, ke la Popola Registaro estas vere helpanta al la naciaj industrio kaj komerco, kaj ĝi "alsendas karbon dum neĝado". En la oftaj kontaktigoj kun ŝtataj funkciuloj mi ne trovis iun ajn maljustaĵon kontraŭ mi, sed male, ili tre estimas min kaj invitis min partopreni

diversajn sociajn aktivadojn, kaj tio donis al mi pli multajn ŝancojn por kompreni la Popolan Registaron kaj ĝian politikon.

Pasis dek kvin jaroj, la laboristoj de nia fabriko multiĝis de la antaŭaj pli ol cent personoj ĝis la nunaj pli ol kvin cent, ĝia produkta kvanto kreskis pli ol trioble ol tiu antaŭ la Liberigo. Antaŭe la aluminaj gispecoj bezonataj estis importitaj, sed nun ni uzas preskaŭ nur enlande produktitajn.

Rilate al mi mem, mi laboras ĝis nun kiel direktoro de nia fabriko. Depost 1956 mi promociiĝis vicestrino de la Industria Kompanio de Metalaĵoj por Ĉiutaga Vivo. Nun mi administras produkton ne nur de unu, sed de pluraj fabrikoj. Mi jam vivis dekojn da jaroj, sed antaŭ la Liberigo mi neniam ĝuis elektan rajton por civitana balotado, nun la popolo elektis min respondeculino de gravaj ŝtataj oficoj, ekzemple, membro de la landa komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco de la Ĉina Popolo, membro de la plenuma komitato de la Unuiĝo de Industriistoj kaj Komercistoj de Ĉinio, popola reprezentanto de Ŝanhajo, vicestrino de la Unuiĝo de Industriistoj kaj Komercistoj de Ŝanhajo, vicestrino de la Unuiĝo de Ŝanhajaj Virinoj ktp... Ĉiujare mi alveturas Pekinon por kunvenado kaj konsiliĝas pri gravaj aferoj de nia lando kun reprezentantoj de diversaj sociaj rondoj. Mi trovas, ke antaŭ nia entrepreno kaj mi mem kuŝas brila estonteco plena de espero.

Krom laboro mi ĉiam ŝatas vojaĝon. En la dek kvin jaroj miaj piedsignoj dissemiĝis preskaŭ tra la tuta teritorio de la patrolando. Mi vizitis la imponan Vuhan-pontegon super Jangzi-rivero, admiris la belon de la pitoreska Jangsuo de Gujlin, ĝuis kvietajn nubojn kaj pinojn de Huangŝan-monto; en la jaro 1961 per aeroplano mi vojaĝis al Hingiang kun amikoj de Industria kaj komerca rondoj, vidis la belan kaj majestan Tianŝan-montaron kaj la novajn urbojn sur Gobi-dezerto. En la pasinteco mi tre sopiris vojaĝi al tiuj lokoj, sed ne povis. Ju pli multe mi vojaĝis, des pli vastiĝis mia spirita mondo; ju pli multe mi amas la pejzaĝojn de la patrio, des pli energie mi laboras.

Dek kvin jaroj estas tre mallonga tempo, sed ĝi lasis neforviŝeblan impreson en mia vivo. El ĝi mi vidis la perspektivon de mi mem kaj de la lando. Mi sentas ke mi rejuniĝas.



Serpentuma ŝoseo sur alta monto.

BEN FAN:

La Disvolviĝo de Ŝoseokonstruado

KIAM fondiĝis la nova Ĉinio ĝi havis nur 75,000 kilometrojn da ŝoseoj apenaŭ taŭgaj por aŭtomobila trafikado. Tio estis la rezultato de la 130,000-kilometra ŝoseokonstruado dum tridek ses jaroj en la malnova Ĉinio. Nun en Ĉinio la funkciaj ŝoseoj jam estas multoble pli longaj ol tiuj en la malnova Ĉinio. Antaŭ la Liberiĝo pli ol duono de la pli ol 2 mil guberniaj urboj tra la tuta lando ne estis atingeblaj per aŭtovojoj. Nun la plejparto de ili jam ĝuas aŭtomobilan trafikon. De la montregionoj ĝis la ebenaĵoj, de la internaj ĝis la landlimaj regionoj, sur la ĉina teritorio de 9,600,000 kvadrataj kilometroj kolosa reto de ŝoseoj jam formiĝis unuapŝe.

RESTARIGO KAJ DISVOLVADO

Post la Liberiĝo la ŝosea konstruado de Ĉinio iras antaŭen paŝon post paŝo.

Dum la periodo de restarigo de la nacia ekonomio de 1950 ĝis 1952, oni faris grandan laboron por restarigo kaj plibonigo de la malnovaj ŝoseoj en la tuta lando. En la tri jaroj, la plejparto de la terure difektitaj ŝoseoj jam ŝanĝis sian fizionomion, kaj la trafikeblaj linioj rimarkinde plimultiĝis.

Dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano de 1953 ĝis 1957 la nove konstruitaj ŝoseoj egalas al la totalo de tiuj konstruitaj dum la 36 jaroj antaŭ la Liberiĝo. La ŝoseoj nove konstruitaj dum la periodo de la Dua Kvinjara Plano de 1958 ĝis 1962 estis pli multaj ol tiuj konstruitaj dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano.

En la lastaj du jaroj, laŭ la postulo de la subtenado al agrikulturo estis konstruita ankaŭ granda nombro da kamparaj ŝoseoj kaj pontoj en diversaj lokoj.

RACIA DISLOKIGO

Antaŭ la Liberiĝo estis malmulte da ŝoseoj, kaj ilia dislokigo estis tre malracia, ĉar la plejmulto de ili konstruiĝis en la apudmaraj kaj ebenaj regionoj. La vastaj limregionoj de la Sudokcidento kaj la Nordokcidento, pli malfrue evoluintaj en ekonomio kaj kulturo, situis fundamente en izola stato sen ajna ŝoseo. Ekzemple, de Lhasa la ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono ĝis Hining la ĉefurbo de Kinghaj-provinco la varoj estis tute transportitaj per tibetbovoj, kaj por veturi tra la longa distanco oni bezonis kelke da monatoj. Kaj krome la vojo estis netrairebla en vintro.

Ekde la plenumado de la Unua kvinjara Plano la vasta amaso de la ŝoseaj laboristoj kaj oficistoj, kune kun la diversaj nacioj de la limregionoj kaj la Popola Liberiga Armeo, trahakis krutajn klifojn ĉiel-skrapantajn, transpasis torentajn riveregojn, konkeris ŝanĝiĝemajn sablejojn kaj glaciriverojn, elhakis vojojn tra malhelaj primitivaj arbaroj, brave konstruis altebenaĵajn ŝoseojn de Kinghaj ĝis Tibeto kaj de Siĉuan ĝis Tibeto longajn entute je pli ol 10,000 kilometroj. Kaj tiel la interna lando estis ligita kun la Kinghaj-tibeta Altebenaĵo—la “Monda Tegmento”, pli ol 4 mil metrojn super la marnivelo. Dank’ al tiuj ŝoseoj la ekonomia kaj kultura vivo de la vasta amaso de kamparanoj kaj paŝtistoj de la Kinghaj-tibeta Regiono ricevis grandajn plibonigon kaj altigon.

ALTIGO DE LA KVALITO

La altigo de la kvalito de ŝoseoj estas akirita per fortigo de la konstanta vojkonserva laboro en multaj regionoj. Ekzemple, kvankam Guangdong-provinco estas pluvoza, tamen pro la establo de specialaj grupoj por vojkonservado en la plej-



Ŝoseo sur monto.

parto de la ĉefaj kaj branĉaj linioj tra la tuta provinco bone iris la konstanta vojflegado, kaj sekve la plejparto de la ŝoseoj en tiu provinco estas en bona stato, kun verdaj arbovicoj ambaŭflanke kaj trafikeblaj kaj en bela kaj en pluva vetero.

Ankaŭ la pontoj sur la ŝoseoj akiris plibonigon paŝon post paŝo. Oni konstruis ankaŭ multajn ŝtonarkajn pontojn firmajn kaj belajn el ĉeloke akireblaj materialoj. La longoj de la spanoj de la ŝtonarkpontoj varias de 30, 50 ĝis 90 metroj, kaj tiu de la plej longa eĉ atingis 112 metrojn. Krome, ankaŭ ferbetonaj pontoj ludas ĉiam pli gravan rolon kaj iliaj strukturformoj estas ĉiam pli variaj.

Ŝoseo en Tianŝan-montaro tra arbaroj kaj neĝejoj.



La Novaj Atingoj de Ĥirurgio en Ĉinio

HUANG GIASI

Profesoro de Ĥirurgio, Direktoro de la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj

EN la Internacia Ĥirurgia Kunveno okazinta en Romo en oktobro 1963, ĉina medicina scienculo raportis pri la sukcesa kazo de rekunigo de detranĉita mano en la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo, kio altiris grandan atenton de la diverslandaj scienculoj ĉeestantaj la kunvenon. Ili konsideris ke rekunigi tute detranĉitan manon, ne nur ĝin postvivigi sed ankaŭ restarigi ĝian funkcion en kelkaj monatoj, estas senprecedenca afero en la mondo.

Dum la pasinta jaro, en la fako de manĥirurgio, la ĉina medicina sciencularo ree akiris novajn atingojn. Ekzemple, estis rekordoj de sukcesaj rekunigoj de tute detranĉita suprabrako kaj la

detranĉita mano je la polmo. En marto 1964, la hospitalo de Giutaj-gubernio, Gilin-provinco sukcese rekunigis kvar fingrojn de kamparano, kiuj estis grave tranĉvunditaj de elektra segilo.

Ankaŭ en la korĥirurgio estis granda progreso en la pasintaj kelkaj jaroj. Antaŭ la Liberiĝo, neniun internakora operacio estis farita en Ĉinio. En 1954, la ĉinaj ĥirurgiistoj komencis puŝi fingrojn en la koron por kuraci kungluiĝintan dupintan valvon, tio estas nomata la metodo de apartigo de la limoj de dupinta valvo (*valvula bicuspidalis*).





De 1954 ĝis 1958, multaj specoj de internakoraj operacioj estis faritaj en Ĉinio, sed ili estis faritaj en certa limo, ĉar la delikataj operacioj por la pli

SUPRE MALDEKSTRE: Montra fingro estis transplantita en la lokon de la maldekstra dikfingro perdita de ĉarpentisto Ĉeng Hiven dum laborado per elektra robotilo.


SUBE MALDEKSTRE: La nova dikfingro kunagas kun la resta jtri fingro en pretenado.

SUPRE DEKSTRE: Movebleco de la fingro transplantita.

SUBE DEKSTRE: La transplantita fingro en tenado.



La verkinto faras operacion.



kompleksa internakora malsano devas esti farita sub senpera vido de la tranĉmalfermita koro.

Por tion fari, estas necese pinĉpremi la grandan sangtubon kunligantan kun la koro, por ke la tranĉmalfermita koro ne sangu. Sed, ĉesigo de sangcirkulado senigos la provizon de oksigeno al la histo de la tuta korpo, kaj se la ĉesigo iom longe daŭros, la histo detruigĝos.

Por venki tiun ĉi malfacilon, oni devas sin turni al la helpo de eksterkorpa cirkulado, kiun ebligas artefaritaj koro kaj pulmo. Tia aparato tamen ne ekzistis tiutempe en Ĉinio.

Dank' al kunlaborado de ĉinaj ĥirurgoj kaj inĝenieroj, fine ellaboriĝis en 1958 aparato por eksterkorpa cirkulado kaj sekve la korĥirurgio en Ĉinio pli rapide progresis.

Nun multaj kormalsanoj denaskaj aŭ postnaskaj ĉiuj povas esti kuracataj per ĥirurgiaj metodoj.

En la sangtubĥirurgio, Ĉinio jam havas sian memkreitajn artefaritajn sangtubojn. En Ĉinio oni povas detranĉi la tuton de aorta arko, kaj ĝin anstataŭigi per artefarita sangtubo.

En alta sangpremo kaŭzita de embolo de rena arterio kaj en nesufiĉa sangprovizo al cerbo kaŭzita de embolo de karotido, oni ankaŭ povas anstataŭigi la obstrukcitan arterion per artefarita sangtubo.

Nuntempe, la ĉinaj ĥirurgoj studas la operacian metodon por krona arterio, por solvi la problemon de infarkto de kor-muskolo (*miocardial infarct*) pro nesufiĉa sangprovizo de krona arterio.

Hepatoĥirurgio estas alia ĥirurgia operacio por kiu Ĉinio akiris elstaran atingon dum la lastaj jaroj. Hepato estas grava organo de la homa korpo, kaj ne povas esti totale detranĉita. Sed, ĉar hepato havas multajn sangtubojn, parta amputo povas kaŭzi seriozan sangadon. Sub tia cirkonstanco, la ĉinaj ĥirurgoj faris esploron per

anatomio de centoj da hepatoj, kaj akiris la scion pri anatomio de la ĉina homa hepato, precipe pri la dislokiĝo de sangtuboj ĉe la hepatpordo kaj interne de la hepato. Tial, kiam ili faras partan amputon al hepato, ili scias de kie komenci la tranĉadon por eviti grandan sangadon.

Kun tia anatomia fundamento, ili faris multajn partajn hepatamputojn, kaj eĉ amputon de pli ol duono de hepato, por multaj pacientoj de hepataj malsanoj (kiel ŝtono en hepatodukto, hepata absceso, benigna tumoro en la hepato kaj hepata karcinomo k.t.p.).

Precipe notinde estas ke hepata karcinomo estas ĝenerale konsiderata kiel nekuracebla malsano. Post la disvolviĝo de hepatoĥirurgio de la ĉinaj ĥirurgoj, iuj pacientoj de kompare limigita hepata karcinomo jam povas havi pli longan postvivon.

Unu el la karakterizaĵoj de la ĉina ĥirurgio estas la apliko de kombina kuracmetodo de la ĉina tradicia kaj okcidenta medicinoj por multaj ĥirurgiaj malsanoj.

Ekzemple, en kuracado de akuta apendicito, la modernaj kuracistoj trovis, post lernado kaj apliko de la ĉina tradicia akupunkturo kaj aliaj metodoj, ke ĉirkaŭ kvardek procentoj de tiaj malsankazoj povas esti kuracitaj sen operacio.

Por kuraci ost-rompon, la metodo de manipula relokigo de la tradicia medicino estas aplikata, kaj latoj kaj aliaj materialoj estas uzataj anstataŭ gipso-bandaĝo por fiksado. Faktoj pravas ke per tiu ĉi metodo la kurac-periodo por iuj ost-rompoj povas esti mallongigita je triono ĝis duono.

Por plialtigi la kuracan efikon de ĥirurgiaj malsanoj la ĉinaj medicinistoj faradas vastan teknikan interŝanĝon kaj ĉiu ajn nova atingo estas forte disvastigata, tiel ke la ĉina ĥirurgio progresu senĉese.

Tri Renkontoj kun la Rivalo

EN ĉiŝoja konkurso de tabloteniso, aranĝita en la Urba Oficejo por Mekaniko kaj Elektro, Lu Hiaŭĉeng, la kvaraklasa lutisto en nia uzino, venkis sinsekve tri maĉojn. Kaj tute neatendite, kiam venis la kvara cirklo de la vira unuopa konkurso, li denove renkontis la rivalon, kiu pasintjare eliminis lin je la dua cirklo.

“Ĉu malgranda Lu povos trapasi?” ni ĉiuj maltrankviliĝis antaŭ la komenco de la maĉo. Kaj ankaŭ malgranda Lu mem diris kapskuante: “Mi ne estas certa, ĉu mi povos gajni la maĉon, sed ĉiukaze mi devos lerni de majstro Ĝang.”

La rivalo estas nomata Ĝang Kijuan, maljuna labormajstro de la Maŝinfabro. Altkreska, li ŝajne jam havas preskaŭ kvindek jarojn. Kiam li ludas tablotenison, li ĉiam elegante tranĉe ĵetadas la pilketon tien kaj reen tute senhaste. Kaj en la lastjara konkurso de tabloteniso, la juna, forta Lu Hiaŭĉeng simple ne rigardis lin kiel indan rivalon.

Sed la afero iradis kontraŭ la konjekto.

En la komenco de la ludo, malgranda Lu aplikis tre variajn manierojn en startofrapo, kaj jen longdistancan vipofrapon, jen ruzan transŝovon, kaj postlasis la rivalon je 12 kontraŭ 4 poentoj. Sed, la kontraŭulo

baldaŭ jam trovis taŭgajn manierojn por rebati, kaj per tranĉo sufiĉe malalte resendis la pilkon malsuprenturniĝanta tiel, ke malgranda Lu estis devigata sinsekve missendis la pilkon kontraŭ la reton per siaj vipofrapoj, kaj definitive majstro Ĝang gajnis la maĉon je 3 : 0.

Malgranda Lu estis venkita, kaj tiel ĉagreniĝis! Post la fino de la ludo, tiu ĉi fierema junulo metis la batilon sur la ludtablon, kaj tuj forrapidis el la ludejo.

Postsekvante lin, ni venis en la koridoron kaj trovis, ke li elpoŝigis naktukon kaj komencis forviŝi larmojn.

“Knabo, ne malĝoju! Kvankam vi estas venkita ĉijare, tamen post pli energia ekzercado vi ja havos eblecon venki en la venonta jaro. Por strategiisto venko aŭ malvenko ja estas ĉiutagaĵo,” diris majstro Ĝang, kiu alvenis al ni nerimarkite. Li enmanigis la batilon al malgranda Lu, dirante: “Ankoraŭ tre juna vi estas, tre tre longan estontecon vi havos.”

Malgranda Lu respondis nenion. Estis vere, ke tiam unu estis varmega kiel flamo dum la alia malvarmega kiel glacio. Poste nia kvinmembra grupeto adiaŭis majstron Ĝang kun granda bedaŭro.

De tiu tempo, ĉe la nigre-verda ludotablo ne plu vidiĝis la figuro de malgranda Lu. Dum la produktaj horoj li laboradis silente, ne plu preparolis kun la kolegoj

pri tabloteniso, kiel en la pasinteco; kaj post la deĵoro li ĉiam kuŝadis legante sen bruo sur la lito.

En la fino de la pasinta jaro, disvolviĝis en plena vikleco la movado por pliproduktado kaj likvido de malŝparo. Ĉiuj kamaradoj de la tuta uzino senescepte cerbumadis, solvojn serĉadis por altigo de kvalito kaj plirapidigo de la produktado, sed la juntoj sur kaldronegoj lutitaj de la lutista grupo, al kiu apartenis Lu Hiaŭĉeng, ofte devis esti refaritaj pro vezikoj trovitaj en ili. Kvankam malgranda Lu jam malesperiĝis rilate al la ludo de tabloteniso, li tamen aktive kaj energie laboregis en la produktado. Tamen malgraŭ sia pena cerbumado li ne trovis la kaŭzon.

Iutage, la Grupo por Popularigo de Lernindaj Spertoj, organizita de la Urba Oficejo por Mekaniko kaj Elektro, venis al la Fabriko de Malaltepremaj Kaldronegoj. La gastoj, akompanate de la fabrikestro, vizitis la laborsekcion de malgranda Lu kaj tiu ĉi ĉe la unua rigardo ekrimarkis, ke inter ili sin trovas majstro Ĝang Kijuan, kaj li ridetis al li iom honte. Majstro Ĝang tamen entuziasme alproksimiĝis, kaj firme premis la manon de malgranda Lu.

Unue majstro Ĝang esploradis la vezikojn sur la juntoj, poste li atente pririgardis la lutostangetojn. Li opiniis, ke la

kaŭzo kuŝas en tio, ke la lutostangetoj malsekiĝis. Li do prenis manplenon da lutostangetoj, iris al la forno kaj bakis ilin por momento. Post tio li tuj suprengrimpis kaldronegon kune kun malgranda Lu kaj komencis luti. Estis ja mirinde, ke ili lutis junton longan je kvin-ses metroj tamen estigis neniun vezikon. Ege ĝojiĝis malgranda Lu kaj la aliaj membroj de la lutista grupo. Al majstro Ĝang unu proponis teon, alia — cigaredon. Malgranda Lu denove ekmemoris la malagrablaĵon pro la perdo de la maĉo, kaj diris al majstro Ĝang: “En la lastfoja pilkoludo malagrablaĵon mi faris al vi; mi petas vian pardonon.”

“Ho, mia knabo,” rediris majstro Ĝang kun serena ridego, “ĉu tion vi ankoraŭ memoras?” Post minuteto li demandis: “Kiel nun estas via tekniko tablotenisa?”

“Ve! Mi ja ne taŭgas por tio, mi jam ne plu ludas tablotenison.”

Aŭdinte tion, majstro Ĝang iom pripensis kaj diris poste: “Vi malpravas, mia knabo. Ne koleru, ke mi vin kritikis. Junulo devas esti sufiĉe forta por elporti fiaskojn, kaj ĉerpi el ili lecionojn. Tiamaniere, li progresos iom post iom. Tio validas kiel por produktado, tiel por ludo de tabloteniso.”



Post la tagmanĝo de tiu tago Ĝang Kijuan ree ludadis pilkon kun Lu Hiaŭĉeng por kelka tempo kaj fine li diris al malgranda Lu: "Viaj frapoj estas sufiĉe fortaj, sed ankoraŭ ne certe trafaj. Estas konsilinde, ke vi vin poste ekzercu por trafi certe."

Post la du renkontoj ili jam fariĝis bonaj amikoj. Komenconte la ludon ĉifojan, malgranda Lu aparte manpremis kun majstro Ĝang kaj petis: "Majstro Ĝang, mi sincere petas ke vi senhezite montru al mi miajn difektojn kiam vi tion trovos."

Jen komenciĝis la maĉo. La diligenta ekzercado de malgranda Lu dum la lasta duonjaro, ja ne vanis. Li ne plu blinde vipofrapis la pilkon, kiel antaŭe, sed per sekura turnfrapo devigis la kontraŭulon alte resendi la pilkon, kaj nur en konvena okazo li eksvingis la batilon por vipofrapi. Sed tamen, estis pli surprize, ke majstro Ĝang kun aĝo de preskaŭ kvindek jaroj, jam pli progresis en la ludarto, ol antaŭ unu jaro. Li ne nur povis ĵeti per tranĉfrapo la pilkon same turniĝanta kaj malate fluganta kiel antaŭe, sed ankaŭ

ĝin flugigi suprenturniĝanta en arko tiel, ke malgranda Lu nur povis ludi defensive, sed ne ataki. Majstro Ĝang gajnis unu ludon. Skuante la kapon malgranda Lu murmuris al ni: "Venki mi ne povas! Same kiel antaŭe!" La gvidanto de nia teamo haste alproksimiĝis al li, kaj donis al li konsilojn. Sekve, dum la postaj tri ludoj, malgranda Lu praktikis la taktikon de mal-longaj turnofrapoj kaj rapidaj puŝfrapoj, ne lasante la kontraŭulon flugigi la pilkon suprenturniĝanta en arko, kaj dume li komencis fortan ofensivon. Rezulte de tio, li gajnis la maĉon je 3:1.

La triumfo de malgranda Lu nin ĝojigis, sed majstro Ĝang ĝojis eĉ pli multe ol ni. Li elpoŝigis viŝtukon, ĝin donis al malgranda Lu por ke li forviŝu sian ŝviton, kaj emocie deklaris: "Gratulon, kara knabo! Mi esperas ke vi daŭre streĉe uzos viajn kapablojn por akiri pluan venkon." "Ne, mia venko estas gajnita dank' al via instruo. Vi estas mia inda majstro kaj en produktado kaj en pilkoludo." Malgranda Lu firme kaptis la manon de majstro Ĝang kaj larmoj aperis en liaj okuloj pro emocio.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

NOVA BETATRONO

Kunlaborante kun koncernaj uzinoj, esploroj kaj altlernejoj, la Ŝanhaja Elektromaŝina Fabriko "Pioniro" sukcese elfaris post dujara penlaborado, betatronon kiun ĝi mem projektis kaj perfektigis.

Tiu instrumento kapablas produkti kelkmilion-voltan alttension kaj akceli la ŝargitajn partikulojn ĝis tre alta rapideco. Ĝi kreis modernan teknikan kondiĉon por disvolvi sciencan esploradon pri atomenergio kaj disvastigi ĝian utiligon en la sfero de la nacia ekonomio.

DEKMIL-TUNA HIDRAŬLIKA PREMILO

La Giangnan-a Ŝipkonstruejo en Ŝanhajo elfaris hidraŭlikan premilon por libera forĝado kiu havas prempovon de 12,000 tunoj.

Dum du-jara prov-uzado montriĝis, ke tre bonkvalita ĝi estas. Dum ĝia superŝarĝa provado, laboristoj plialtigis la prempovon ĝis 16,000 tunoj kaj trovis, ke la maŝino restas bona en ĉiu parto.

En la pasinteco, pro manko de tia grand-tipa ekipaĵo por forĝado, Ĉinio devis importi grandnombro da maŝinpartoj uzataj en pezaj maŝinaparatoj. La sukcesa fabrikado de la hidraŭlika premilo kreis pli potencon teknikan kondiĉon por disvolvi la ĉinan modernan industrion sin apogante sur siaj propraj fortoj.

FILMBAZA FABRIKO

La unua moderna laborejo por produkti impresan filmbazon de la Ŝanhaja Impresfilma Fabriko projektita de Ĉinio mem finkonstruiĝis.

En la pasinteco la fabriko devis fari el importita filmbazo kinofilmajn pozitivajn, fotofilmajn rulojn kaj foliojn, X-radiajn filmojn aŭ impres-filmojn uzatajn en scienca esplorado kaj industrio. Kun la konstruiĝo de la nova laborejo, la fabriko jam

fariĝis ĉiopova fabriko por produktado de filmoj.

LERNEJOJ POR STUDIO KAJ LABORADO

Last-aŭtune, en Pekino, Ŝanhajo k. a. lokoj fondiĝis lernejoj en kiuj oni parte lernas kaj parte laboras. En tiuj ĉi regulaj lernejoj novtipaj praktikata estas la principo kombini edukon kun laboro kaj produkto por elkulturi novajn homojn kun socialisma konscio kaj kapabloj por fizikaj kaj mensaj laboroj.

Tiuj lernejoj plejparte estas establita de fabrikoj, minejoj, entreprenoj aŭ popolaj komunumoj. La fakoj kaj kursoj de tiaj lernejoj estas starigitaj laŭ la bezono de produktado. La lernantoj devas lerni, krom politikon, lingvon, fizikon kaj kemion, ankaŭ fakajn sciojn kaj labori en fabrikoj, minejoj aŭ produktaj brigadoj. En tiuj lernejoj instruas ne nur profesiaj instruistoj sed ankaŭ inĝenieroj kaj teknikistoj de la fabriko, minejo k. s. kaj spertriĉaj maljunaj laboristoj kaj kamparanoj.

UNUJAJ DIPLOMITOJ DE LA PERTELEVIDA UNIVERSITATO

En septembro de 1964, diplomigis la unuaj 202 gestudentoj de la Pekina Per-televida Universitato.

Tiu ĉi novtipa postlabora universitato fondiĝis en marto de 1960. Inter la studentoj troviĝas sciencaj kaj teknikaj laborantoj, ŝtataj oficistoj, laboristoj, kaj instruistoj de mezgradaj kaj elementaj lernejoj. Ili jam sisteme ellernis la fundamentajn teoriajn kursojn kaj sukcese pasigis la ekzamenon por diplomigo gajninte bonajn notojn pri matematiko kaj kemio kiel en ordinara universitato.

DU VOLUMOJ DE "ELEKTITAJ VERKOJ DE MAŬ ZEDONG" EN FREMDLINGVOJ

La Fremdlingva Eldonejo de Ĉinio eldonis, okaze de la ĉina Nacia Festo (la

1-an de oktobro) en la lasta jaro, la 1-an volumon de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* en 4 volumoj en la angla lingvo kaj lian libron de *Primilitaj Verkoj* en la rusa.

La angla eldono de la *Elektitaj Verkoj*, vol. I enhavas 17 verkojn de Prezidanto Maŭ Zedong skribitajn dum la periodoj de la unua kaj dua enlanda revolucia milito. La libro de *Primilitaj Verkoj* enhavas 29 verkojn pri milito skribitajn dum ĉiuj historiaj periodoj de la ĉina demokratia revolucio.

ALIA GRUPO DE KAMPARANAJ SCIENCISTOJ

Antaŭ ne longe en Fugian-provinco pli ol 40 kamparanoj estis nomitaj kiel esploristoj aŭ specialaj esploristoj. Tiuj kamparanoj atingis sukcesojn en diversaj fakoj en agronomaj eksperimentadoj. Ekzemple, en la Hianjoŭ-gubernio, la 68-jara Lu Caj, terkulturisto sperta en kulturado de novaj specioj, elkulturis sian bonan specion de frurikolta rizo nomita "Lu Caj". Ĝi jam vaste uziĝis en la pasintaj ok jaroj sur pli ol 10,000,000 muoj en multaj lokoj de la lando. La kamparanodevena kadro Ĉen Deŝun de Fukin-gubernio kaj teknikisto Lin Hongda kreis la sistemon de alterna plantado en kampo iam kun kaj iam sen akvo. Tio donas tri rikoltojn ĉiujare kaj faras la produktadon stabila kaj grandkvanta.

PLI OL 40,000 SEPDEK-JARULOJ EN KANTONO

Malnova ĉina proverbo diras: "Homoj sepdekjaraj estas ĉiam raraj", sed tiaj grandaĝuloj nun pli multas de tago al tago. Laŭ la enketo farita lastatempe en Kantono, estas pli ol 47,000 maljunuloj kun aĝo de pli ol 70 jaroj, kaj 3 el ili havas pli ol cent jarojn respektive. Ili ĝuas feliĉan vivon en la nova socio.

INTER VENDISTOJ KAJ KLIENTOJ

MI ankoraŭ memoras, ke en la malnova Ĉinio iuj butikoj propagandis al la klientoj per surskribo sur siaj elpendaĵoj, ke ili estas "HONESTA TIEL AL LA INFANOJ KIEL AL LA AĜULOJ", dum efektive oni ofte kaj senfine informiĝis pri reciproka trompado inter komercistoj kaj aĉetantoj. Sed nun mi aŭdis historiojn tute malsamajn.

REDONI MONON AL LA BUTIKO

Antaŭ ne longe, Ĝang Huajfeng, laboristino de la Tiangina Dizel-fabrika, venis kun sia infano al la butiko de flankaj manĝaĵoj en Vertikala Strato n-ro 11, ŝi diris: "Mia infano ĵus aĉetis botelon da sojsaŭco. Post lia reveno ni trovis ke vi donis al li du superfluaĵajn juanojn da restmono." La vendisto diris: "Neeble! Li donis al mi unu banknoton de kvin juanoj." Ĝang Huajfeng pensis kun miro: mi ja donis al la knabo trijuanan banknoton, kiel ĝi povus fariĝi kvinjuana?

Reveninte hejmen, ŝi ekzamenis la aferon kune kun sia edzo, kiu diris: "Kiam mi ricevis hodiaŭ la salajron, mi havis nur unu trijuanan banknoton, dum ĉiuj aliaj estis kvinjuanaj." Ekzameninte ĉiujn banknotojn ŝi trovis ke ili estas kvinjuanaj. Hodiaŭ nenion alian ŝi aĉetis. Certe la butiko donis tro multe da restmono. Pro tio, ŝi denove iris al la butiko kaj faris klarigon al la vendistoj. Post zorga kontrolado la fakto konfirmis ke ili misprenis la trijuanan banknoton kiel kvinjuanan. La vendisto multe ŝin dankis, sed Ĝang Huajfeng diris ridetante: "Nenio! La mono ja apartenas al la butiko, do mi devas ĝin redoni al vi."

SES DEKONOJN DE CENDO TRO MULTE

Iun nokton, kiam la nutraĵbutiko n-ro 59, en la kvartalo Hongkiaŭ en la urbo Tiangin, faris sian tagan bilancon, vendisto Guo Tingju trovis eraron en sia konto. Kiel fariĝis la eraro? Oni ricevis superfluan pagon en vendado de vermicelo. Laŭ la instrukcio de la Buroo de Nutraĵo, ekde tiu tago la prezo de vermicelo devis malaltiĝi 6 dekonojn de cendo por ĉiu ĝino (= ½ kg). Pro nesingardemo, ili tion forgesis kaj vendis laŭ la origina prezo. Ili forvendis cent naŭdek kvin ĝinojn kaj sekve ricevis de la klientoj unu juanon kaj dek sep cendojn da superpago. Trovinte tion, ili estis tre maltrankvilaj. Kion ili faru pri la superpago? Post interkonsiliĝo, ĉiuj opiniis: "Ĉar nia entrepreno estas socialisma, ni ne devas tropagigi la klientojn. Ni devas iel redoni la monon kaj plenumi nian devon al la ŝtato kaj la klientoj." Cerbuminte dum longe, ili finfine sukcesis redoni la monon al la klientoj, kaj petis de ili

pardonon. La klientoj estis kortuŝitaj de ilia konscienca labormaniero.

BONA KONSILANTO DE KLIENTO

Iun matenon, juna blindulino eniris la bazaron de Nanŝi en la urbo Tiangin. Aŭdinte la voĉon de la vendistino Ju Hongpin kiu interparolis kun iu kliento, ŝi alproksimiĝis al ŝi. "Bonvole diru al mi, kion vi volas aĉeti?" afable demandis Ju Hongpin, kiu siaflanke rapidis al ŝi renkonte. "Mi volas aĉeti ŝtofون por mia vesto. Bonvole elektu ion por mi. Kio plaĉas al vi, tio ankaŭ plaĉas al mi." La blindulino ofte venis por fari aĉeton, kaj Ju Hongpin ĉiam servis ŝin afable kaj varme, tial ĉiufoje, kiam ŝi volis ion aĉeti, ŝi nepre venis al Ju Hongpin.

Tiun ĉi tagon, aŭdinte ke ŝi volas aĉeti ŝtofون, Ju Hongpin eliris de post sia montrotablo de diversaj kaj iris kun ŝi al la fako de kotonŝtofo. Longe elektinte kaj ne trovinte ŝtofون taŭgan al la klientino, ŝi diris: "Mi proponas ke vi aĉetu konfekcion, ĉu bone?" Sekve, Ju Hongpin venis kun ŝi al la fako de vestoj kaj elektis por ŝi belan veston. Aŭdinte ke ŝi volas aĉeti ankaŭ naztukon kaj vizaĝkremon, ŝi diris: "Restu ĉi tie kaj mi aĉetos por vi!" Ŝi iris al la fakoj de trikoto kaj kosmetiko, kaj aĉetinte ĉion por la blindulino, ŝi helpis ŝin eliri la pordon.

NEVIDEBLA "PONTO"

La sekcio de plastaj ŝuoj en Kjuanĵe-bazaro de Tiangin ĉiam prosperas en sia negoco. Iun tagon, tri junulinoj en laboristaj vestoj varme diskutis pri diversaj tipoj de virinaj ŝuoj metitaj en montro-ŝranko. Trovinte tion, la vendisto alproksimiĝis kaj afable salutis: "Ĉu vi volas ŝuojn?" "Ne. Antaŭ kelkaj tagoj ni jam aĉetis. Hodiaŭ post laborhoru ni venis por vidi la novfasonajn ŝuojn." Unu el ili, iom pli-aĝa, montrante du specojn de virinaj sandaloj, belaj kaj simplaj, demandis: "Ĉu multaj aĉetas tiajn ŝuojn?" "Ĉiutage ni vendas kelkcent parojn." Aŭdinte tion, la tri klientinoj ekrigardis unu la alian, kaj kontente ekridetis.

Kial la tri laboristinoj tiel interesiĝis pri la du specoj de sandaloj? Ĉar antaŭ nelonge ili sendis kelkajn proponojn por plibonigi la strukturon de du specoj de plastaj ŝuoj kaj la vendisto transdonis iliajn proponojn al la industria branĉo, kaj oni laŭ la proponoj faris multan plibonigon. Pro tio, la novaj ŝuoj fariĝis pli plaĉaj al la klientoj.

Oni diras ke la laborantoj de komerco ĉiam servas kiel ponto inter la produktantoj kaj konsumantoj. En Ĉinio mi ja vidis multe da tiaj nevideblaj pontoj.



Ĉinaj Popolaj Ludoj dum la Printempa Festo



La dua de februaro en tiu ĉi jaro estas la plej granda tradicia festo ĉiujara de la ĉina popolo — la Printempa Festo. Dum la ĝoja Printempa Festo, la nacioj de Ĉinio kutimas fari diversajn korpokulturajn agadojn kaj ludojn. Jene ni prezentas kelkajn el la tradiciaj agadoj.

LEON-DANCO

Leon-danco estas unu el la agadoj ŝatataj tra la tuta lando. La leono estas ludata de du homoj kune vestitaj en unu leon-masko vesto. Dum la Printempa Festo, oni dancas leonodancon kun tamtamado kaj tamburado kaj tiel gajigas la festan atmosferon. Por tiu danco la polamaso en la vilaĝoj de Guangdong-provinco ofte konstruas altajn pli ol 3 metrojn altan, el tabloj kaj seĝoj. Suririnte la supron de la altaĵo la leono lerte prezentas diversajn akrobataĵojn. Por tion fari la ludantoj de leono devas esti sufiĉe fortaj kaj viglaj kaj bone kunagadi.

ĈASADO

La junuloj de la vilaĝoj de la nacimalplimulto Li en Hajnan-insulo en la tago de Printempa Festo kaj en la sekvanta tago kune eliras por ĉasado kaj forigo de malutilaj bestoj. La ĉasado apartenas al la tuta vilaĝo.

STILZO-DANCO

Ankaŭ stilzodanco estas unu el la popularaj sportludoj dum la Printempa Festo en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de Ĉinio. La stilzoludantoj prezentas diversajn teatraĵojn aŭ dancojn. La alteco de stilzoj varias:

la ĉirkaŭ unu futon altajn oni tenas per la manoj, kaj tiujn kun alteco de 2 aŭ 3 metroj oni ĉirkaŭ-ligas al la kruroj. Iuj stilzoj estas preparitaj por plenaĝuloj kaj iuj por knaboj. Tio estas ŝatata precipe en la urbetoj de la provincoj Anhuĵ, Giangsu, k.a.

PAFKONKURSO

La junuloj de la nacio Ĝingpo en Junnan-provinco kutimas ludi dum la Printempa Festo konkurson de pafado. Ili ĝin nomas "tangtje". Knabinoj estas la organizantoj kaj juĝantoj. Pendiginte malgrandan monujon per fadeno sur bambuan stangon kaj metinte la stangon sur arbon, ili petas la pafistojn celi al la monujo. Tiun kiu la unua paffaligis la monujon, la knabinoj honoras per trinkigo de vino. En la monujo estas metita unu monero, kelkaj grenoj kaj kelkaj bidoj por ornamo, kiuj estas simbolo de feliĉo.

RAD-BALANCILO

La kamparanoj en la suda parto de Gansu-provinco starigas dum la Printempa Festo, vertikale draŝruliilon, en kies pivotkavon oni starigas kolonon kun alteco de unu viro. Sur la pinto de la kolono horizonte oni metas stangon kaj ĉe la du ekstremoj de la stango ligas po ŝnurpcon kun ringo ĉe la libera fino. Du homoj povas sidi en la ringojn kaj ronde ŝvebi. Tio estas tre interesa kaj tre utila por ekzerci la nervojn de la ludantoj.

TABLO-LUDO

En la vilaĝoj de la orienta parto de Ĝegiang-provinco, la polamaso

ŝatas ludi dum la Printempa Festo la gimnastikan tablo-ludon. Sur kvadrata tablo aŭ sur sep aŭ ok tiaj tabloj metitaj flankon ĉe flanko, la ludantoj saltadas, ekstaras kapomalsupren, saltas transkapiĝe, tien kaj reen, lerte kaj rapidmove. Dum tia prezentado kutime svarmas rigardantoj kun granda gajeco.

KONKURSO DE RAJDADO KAJ SAGOPAFADO

En Interna Mongolio la nacimalplimulto Olunĉuno kutimas okazigi dum la festo rajd-konkurson kaj konkurson de sago-pafado.

BALANCADO

Por ĝoje celebri la Printempan Feston la junuloj en ĉiuj vilaĝoj de Hani-nacio en Junnan-provinco kutime starigas trapezojn el bambuaj stangoj kun alteco de ĉirkaŭ 10 metroj. Dum la festo ĉiuj sin vestas per la plej ŝatataj vestoj kaj iras por svingi sin sur la trapezoj. Tiam prezentiĝas ankaŭ bonaj ŝancoj por la gejunuloj por trovi amaton aŭ amatinon.

VOLAN-LUDO

Volan-ludo estas tre vaste ŝatata de ĉinaj geknaboj en la urboj kaj vilaĝoj kaj tre utila por la sano. En multaj urboj kaj vilaĝoj de Siĉuan-kaj Hunan-provinco, geknaboj faras por la Printempa Festo diverskolorajn volanojn, ilin lerte piedbatadas en diversaj manieroj kaj eĉ faras konkurson de tiu ludo.



“Ruĝas la Oriento”


Eposo de Muziko kaj Danco

EN la artobedo de Pekino elkreskis nova floro — “Ruĝas la Oriento”, la muziko-danca eposo kiu pompe ekbrilis kiam la ĉina popolo ĝoje celebris la dekkvinan datrevenon de la fondiĝo de la socialisma respubliko.


Per atmosfero de granda revolucia impetado kaj grandiozaj scenoj “Ruĝas la Oriento” prezentas la feran volon de la ĉina popolo batali sin apogante sur si mem, strebi al sia potenciĝo, venki ĉiujn malfacilojn kaj konduki la revolucion ĝis la fino kune kun la vasta popolamaso de la tuta mondo dum la gravaj historiaj periodoj post la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio. Ĝi estas eposo de la ĉina revolucio, himno al la pensoj de Maŭ Zedong. Ĝi estas granda sukceso

de la ĉinaj muziko kaj danco en la socialisma kultura revolucio.

La prezentadon de tiu ĉi grandioza muziko-danca eposo partoprenis pli ol 3000 personoj. Ĝi estas plena de patoso, kaj riĉa je nacia koloro kaj popolamasa gusto. Oni zorgeme elektis tipajn mediojn kaj karakterizajn detalojn de diversaj stadioj de la ĉina revolucio, tiel ke la eposo fariĝis miniaturo de la ĉinpopola historio pri ĝia luktado por liberiĝo, ke ĝi fidele respegulis la akiron de nova vivo de ĉiuj nacioj sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong. Ĝi alprenis la formon de “kantoj kaj dancoj” ŝatatan de la ĉina popolo, kaj konsistas el pli ol 30 revoluciaj kantoj kaj pli ol 20 dancoj, 5 el kiuj estas kantatoj, 7 kantoj kun prezentado kaj 18 deklamoj intermetitaj.



En la malnova Ĉinio la popolo ĝemis subpremate de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, kaj ripete levis la standardon de ribelo. Sur la parka avertilo skribiĝis “Eniro malpermesata al la ĉinoj kaj hundoj”.



SUPRE: En apr. 1928, la du revoluciaj armeoj gvidataj de k-doj Maŭ Zedong kaj Ĝu De renkontiĝis ĉe Ging-gang-monto kaj starigis tie la unuan bazon de la Ruĝa Armeo.

SUBE: Ruĝarmeanoj batalas por okupi strategian pasejon dum la Longa Marŝo.

La tuta verko dividiĝas en 8 partojn, nome, “Aŭroro en la Oriento”, “Fajrero Bruligas la Stepon”, “La Longa Marŝo”, “Rezista Milito kontraŭ Japanio”, “Entombigo de la Ĉiang-Kajŝeka Reĝimo”, “Leviĝis la Ĉina Popolo”, “Antaŭen Marŝas la Patrio”, “La Mondo Antaŭen Marŝas”.

Kun la impona uverturo de la horaĵo “Ruĝas la Oriento” iom post iom malfermiĝis la kurteno. Multe da “sunfloroj” ridas al la suno leviĝanta el la maro sur la fono, jen ili ekdancetas en formo de sunfloraroj, kaj jen formas kune unu grandegan sunfloron. Ĝiaj belaj petaloj frapas la okulojn per brileco. Tio vive simbolas ke “la sunfloroj sin direktas al la suno kaj la popolo al la Partio”.

Sed la ĉina popolo neniel povas forgesi siajn suferojn en la pasinteco, forgesi la longan malfacilan vojon kiun ili trairis gvidate de Prezidanto Maŭ Zedong. Subite

malheliĝis la scenejo, mal-laŭtiĝis la muziko, ploretas fluto. Oni vidas usonan militŝipon en Huangpu-rivero ĉe Ŝanhajo. Ŝarĝistoj kun kurbaj dorsoj laboregas beste sub gardo de la malamiko. Ili estas vipataj aŭ mortpafataj. Malriĉaj homoj vendas siajn infanojn. Jen patrino vendinta sian filinon korŝire ploregas. Ĉu tio okazis nur en unu loko kaj en unu familio? Ne, tio estas vera bildo pri la tuta malnova Ĉinio. La multe suferanta popolo de Ĉinio ĝemas sub la premado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo. Senlima estis la nokto kaj longa la vojo...

Tamen la nokto venas al la fino kaj la tago eklumas antaŭ ĝi. Kiel Prezidanto Maŭ diris, ke la kanona tondro de la Oktobra Revolucio sendis al la ĉina popolo marksismo-leninismom. Nun sur la fono aperas grandaj portretoj de Marks kaj Lenin. Naskiĝas la Komunista Partio de Ĉinio.

Kaj la ludantoj kaj la spektantoj en la halo ĉiuj ekscitiĝis de ĝojo.

La revolucio estis antaŭen marŝanta, kaj la ruĝaj bazlokoj pli vastiĝis. Kiam la oportunistoj direktis la revolucion sur

eraran vojon, la kunveno de Zunji forpelis la densan nebulon kiel suno leviĝanta kaj lumigis la vojon al venko de la revolucio. Maŭ Zedong, la granda direktlisto de la ĉina popolo reĝustigis la direkton de la revolucio kaj levis ĝian velon kontraŭ la vento, kaj ĝin gvidis antaŭen tra torentoj kaj danĝeraj malprofundejoj.

Rapide ŝanĝiĝas la scenoj. Subite la orkestro sonigas vigran melodion kaj kondukas la rigardantojn al la bordo de Dadu-rivero. Super la furiozaj ondoj pendas en la aero la kabloponto. Ruĝarmeanoj sturmas por okupi la strategian trapasejon. Ili sin ĵetas antaŭen unuj post aliaj kuraĝe kaj rapidmove spite al mortodanĝeroj. Tiel bravaj kaj malcedemaj ili estas en la batalado. Same kun tiu ĉi spirito la ĉina popolo venkis la japanajn invadantojn kaj entombigis la reakcian reĝimon de Ĉiang Kajŝek.

Rigardu! Oni tiom ĝojas kun larmoj en la okuloj kaj aŭskultas la mondkuan proklamon de Prezidanto Maŭ Zedong: La Ĉina Popola Respubliko naskiĝis! Kaj la ĉina popolo starigis!

Sennombraj ruĝaj flagoj ĉirkaŭis la Ĉielpacan Pordegon, sub kies tegmentando brilas grandaj ruĝaj lanternoj. Viroj kaj virinoj en belaj festaj kostumoj ĝojkrias kaj plenvoĉe kantas malsupre de la portreto de Prezidanto Maŭ Zedong. Ili prikantas la brilan grandan socialisman patrion. Ĉiuj nacioj de la lando unuanime kaj energie laboregas por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie. La ĉina popolo

nepre liberigos sian landparton Tajvan, kaj antaŭenpuŝi la socialisman revolucion!

Sur la scenejo nun aperas militistoj de la Ĉina Liberiga Armeo kaj gemilicanoj en arda ekzerco pri militoperacio. Ili estas viglaj kaj kun alta batalspirito montrante la heroan fizionomion de la ĉiovenkaj popolaj armeanoj. Kaj la grandega ĥoro aŭdigas la kanton "Nepre ni starigos la triumfajn standardojn en Tajvan". Tio refoje donas fortan ĵurpromeson de la ĉina popolo por konduki la revolucion ĝis la fino, kaj faras fortan impreson sur la rigardantojn.

Tuj sekve bonorde enmarŝas aro da junpioniroj. Belaj kaj blankaj vestoj, ruĝaj koltukoj kaj feliĉaj ridantaj vizaĝetoj... ili estas ĵus leviĝanta suno, ili estas floroj kun rospertoj... Ili kantas: "Ni estas daŭrigontoj de la komunisma afero!" Ilia arĝenta voĉo elkantis la printempon de la nova Ĉinio, kaj kiom da belaj pensoj ili vekis pri la brila perspektivo de la patrio... Oni ne povas sin deteni de bondezirado al ili: Karaj infanoj,—vi juna generacio de la proleta revolucio, kresku sane kaj forte!

Sur la fono aperas senlima lazura ĉielo sur kies fono okulfrapas grandaj rubandoj kun la sloganoj: "Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!", "Vivu la solidareco de ĉiuj popoloj!" kaj maro da flirtantaj ruĝaj flagoj. La revolucia tajdo tondras en ĉiuj partoj de la mondo.

Nun sur la scenejon venas man-en-mane gefratoj kun diversaj kostumoj kaj haŭtkoloroj. Ili levas la pugnojn kaj laŭte kunkantas "Monto ĉe mont', maro ĉe mar', firme unuiĝu la mond-proletar'..." la kanto kondukas la rigardantaron al la kulmino de ĝoja ardo, kaj montras al ni la grandan idealon de la revolucia popolo.

La Aŭtunrikolta Ribelo (danco)

En la jaro 1927, Ĉiang Kajŝek perfidis la revolucion kaj komencis teruran buĉadon de revoluciuloj. Tiam la Komunista Partio de Ĉinio alvokis armitan ribelon dum la aŭtuna rikolto. Tiun ribelon gvidis kamarado Maŭ Zedong. Poste li gvidis la ribelintojn al Ginggang-monto kaj starigis tie revolucion bazon. Fotoj de Liaŭ Ĝigen


Nannivan (kantodanco)

Dum la ĉina popolo heroe batalis kontraŭ la japanaj invadantoj, la Ĉiang Kajŝeka reakciularo direktis siajn pafilojn al siaj samlandanoj kaj blokadis la liberigitajn regionojn. Responde al la alvoko de la Kompartio kaj k-do Maŭ Zedong, la popolo kaj armeo en la liberigita regiono lanĉis produktan kampanjon kaj venkis ĉiajn malfacilojn per siaj propraj fortoj por subteni la longdaŭran rezistadon.



Laborista danco.

Kanto pri abunda rikolto.





*Fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko!
Ĉiuj nacioj de Ĉinio ĝoje celebras
ĝian brilan naskiĝon.*





GRANDA FESTOTAGO (kantodanco)

Foto de Liaŭ Ĝigen

A SUNFLOROJ SEKVAS

A SUNON (kantodanco)


Foto de Liaŭ Ĝigen

a sunfloroj

ĉiam sekvas sunradion,

a popolo

ĉiam sekvas Kompartion.



FIRME UNUIĜU LA MONDPROLETAR'!





Grupo da vojaĝantoj organizita de la Ŝanhaja Turista Servo atingis sian celokon.

Ĝang Deji:*

La Turisma Vivo de la Ŝanhajanoj

ŜANHAJO estas la plej granda urbo en Ĉinio. Ĝiaj loĝantoj tre ŝatas vojaĝi, precipe dum la festoj kaj la libertempoj la vojaĝantoj estas pli multaj.

Nun pluraj turistaj servoj naskiĝis en Ŝanhajo por bone ilin servi. La Ŝanhaja Turista Servo estas unu el ili.

Laŭ la diversaj interesoj de la turistoj ni aranĝis multajn specojn de vojaĝoj, nome vojaĝojn en printempo, vojaĝojn al lokoj kun milda vetero en somero, vojaĝojn por ĝue promeni sub la plenluno aŭ rigardi osmantojn (*Osmanthus*) en aŭtuno, vojaĝojn por aprezi kalikantajn (*Calycanthus*) florojn en neĝtago k.t.p. Krome ni aranĝis ankaŭ vojaĝojn de studentoj kaj instruistoj dum la someraj ferioj, vojaĝojn por fotamatoroj k.t.p. kaj laŭ la longeco de la distancoj la vojaĝoj povas klasiĝi en unutagajn, dutagajn, tritagajn, kvintagajn, kaj pli-ol-dektagajn. En la Unua de Majo, la Internacia Laborista Tago de la pasinta jaro ni aranĝis vojaĝojn al dudek sep lokoj en malsamaj distancoj. La turistoj ekveturis unuj post aliaj en tridek kvin grupoj. La mallongaj kaj mezlongaj vojaĝoj estis tiuj al dudek du lokoj, nome, Suĝoŭ, Hangĝoŭ, Jangĝoŭ, Nankino, Fuĉun-rivero k.t.p. La longaj estis tiuj al kvin lokoj, nome, Gujlin, la monto Huangŝan, Pekino k.t.p. Kvankam la limigita nombro de partoprenantoj estis grandigita je unu kvarono ol en la lastaj jaroj, tamen la nombro de la mendantoj estis tro granda, kaj multaj homoj ne povis partopreni.

Foje ankaŭ mi vojaĝis al Suĝoŭ kune kun la turistoj. Tiun vojaĝon partoprenis ducent kvindek homoj,

el kiuj estis laboristoj, kamparanoj, studentoj, instruistoj, kuracistoj, emeritoj, industriaj kaj komercaj laborantoj k.t.p., junaj kaj maljunaj, viraj kaj virinaj, el kiuj estis multaj geedzaj paroj, kaj eĉ tutaj familioj. Ni veturis per kelkaj "Liberiĝo-" aŭtobusoj. Sur la vojo ni ĝoje babilis kaj kantis unuj post aliaj. Mi babilis kun maljuna virino sidanta apud mi. Ŝi estas membro de la komunumo Sanlintang en Pudong. Ŝi diris al mi: "Nun miaj infanoj ĉiuj havas laboron. La vivo boniĝis, sekve mi volas vojaĝi por min amuzi."

Kiam nia aŭtobuso atingis la montpiedon de Hukiu, ambaŭflanke de la ŝoseo antaŭ la montpaseja por-do svarmis aŭtoj. Iu knabino estis naive kalkulanta la aŭtojn unu post alia. Fine ŝi rekuris al sia pliaĝa frato kaj laŭte diris: "Mi jam elkalkulis la aŭtojn, ili estas sume ducent ses."

Priparolante Suĝoŭ, oni tre nature ekpensas pri Hangĝoŭ. Hangĝoŭ estas vere ĝardenurbo mondfama. Ĝi fariĝas pli kaj pli ĉarma. Dum la printempaj ferioj en 1964, mi akompanis la gastojn vojaĝi al Hangĝoŭ per aeroplano. Tra la lukoj de la aeroplano ni malsupren rigardis al la vasta tero de la patrio, la belaj montoj kaj riveroj, la riĉaj kampoj. Ni estis tre kortuŝitaj. Emerita maljuna laboristo dume diris al mi: "En la malnova socio mi deziris iutage veturi per aeroplano, sed oni diris, ke mi min lasis sonĝi tage kaj konvenas por mi nur rigardi aeroplanon sur la tero! Nun mi tamen jam veturas per aeroplano." La vortoj de la maljunulo estas vere el lia koro.

Antaŭ la Liberiĝo en Ŝanhajo troviĝis turistaj servoj kiuj servis nur al la malmultaj riĉuloj por iliaj "altaj distroj". Kaj eĉ tiuj homoj ne povis ĝui veran liberon kaj ĝojon en la vojaĝo, ĉar tiam la vojaĝado estis ne sekura. Oni ofte devis kunporti gardiston. Koncerne al la vasta popolamaso, ili eĉ ne povis sin vivteni, por ne paroli pri vizito al vidindaĵoj. Nur nun dank' al la senĉesa disvolviĝo de la produkto, la vivo kaj la sociordo ĉiam pli boniĝas, kaj la turisma aktivado fariĝas ĉiam pli esenca parto de la postlabora vivo de la popolo.

*La verkinto de tiu ĉi artikolo estas vicdirektoro de la Ŝanhaja Turista Servo.

14 Ĉinoj Centjaraj

8 centjaruloj nun troviĝas en la popolo de la Hjunhua-a Aŭtonoma Gubernio de Sala-nacio en Kinghaj-provinco, sur altebena 2,000 metrojn super la marnivelo. El ili estas 4 viroj kaj 4 virinoj. La plej aĝa estas virino de 106 jaroj, kies nomo estas Mahatimaj.

En la pasinta somero, kiam oni faris enketon pri tiroidito de loka karaktero en du gubernioj Aksu kaj Vensu en Hingiang, oni trovis aliajn 6 centjarulojn, el kiuj 5 estas viroj kaj unu virino. Ĉiuj ili estas ujguroj. La plej maljuna Tohati havas jam 120 jarojn. Krome en tiuj tri gubernioj estas nombro da maljunaj homoj pli ol 90-jaraj. Ili estas sanaj kaj kapablaj por memoro. Al Tohati eĉ kreskis 2 tranĉaj dentoj en lia aĝo de 117 jaroj.

Ĉiuj ĉi tiuj grandaĝuloj havas la komunan kutimon neniam fumi tabakon, neniam trinki alkoholaĵon kaj malvarman akvon kaj ĉiuj ili estas el familioj de laborantaj kamparanoj, ili ĉiam sin okupas per laboroj kaj vivas bonorde. Kelkaj ĝis nun ne povas senĝene resti senfaraj kaj emas sin okupi per nepenigaj laboroj.

Tiuj maljunuloj ĉiuj ricevas prizorgojn de la loka registaro kaj komunumoj, vivante en feliĉo.

“La Fajreroj en Fragmitejoj”

(Pekina Opero)

“La Fajreroj en Fragmitejoj” estas unu el la eminentaj pekinaj operoj prezentitaj dum la Festivalo de Pekinaj Operoj kun Modernaj Revoluciaj Temoj, kiu okazis en Pekino, julie de 1964. Tiu ĉi opero estas bonvenigata de la vasta rigardantaro depost sia sursceniĝo. Ankaŭ la gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong kaj aliaj ŝtatgvidantoj rigardis ĝin kaj akceptis la geaktorojn.

La opero temas pri lukto kontraŭ naciperfiduloj okazinta en la vilaĝo Ŝagiabang ĉe lagbordo en suda Giansu-provinco, dum la rezistmilito kontraŭ la japanaj invadantoj.

Tiutempe, la plejparto de la provinco jam estis okupita de la japanaj invadantoj. La Nova Kvara Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio persiste batalis kontraŭ la japanoj, sed, hipokrite kriante sloganojn kontraŭ-invadajn, la Ĉiang Kajŝek-a registaro klopodis ekstermi ĝin en komploto kun la japanoj kaj ilia puparmeo. Ankaŭ Ŝagiabang estis angulo de scenejo de tiu batalo.

Bofranjo Aking, la heroino de la opero, estas subtera interliganto de la komunista partio, publike konata kiel tetrinkeja mastrino. En la komenca periodo de la rezistmilito, ŝi savis Hu Ĉuankuj, kiu tiam partoprenis la rezistadon kontraŭ la japanoj, sed nun li sin apogas sur la fortojn de Ĉiang Kajŝek kaj estas komandanto de trupo, kiu komplotas kun la japanoj kaj ilia puparmeo. Diaŭ Deji, reakcia bienulo de Ŝagiabang, fariĝis lia stabestro.

En la komenco de la opero, trupo de la Nova Kvara Armeo sin retiras post ĉirkaŭira militiro kaj postlasis 18 vunditojn kaj malsanulojn, kiujn oni sendas al Ŝagiabang por kaŝi en granda fragmitejo de la lago.

Tiam venas la trupo de Hu Ĉuankuj por traserĉi kaj kapti la malsanulojn. Sed sub la gvido de la partio kaj subtenate de la popolamaso, Bofranjo Aking sagace ŝirmis la malsanajn kaj vunditajn kamaradojn de danĝero. Kaj profitante la edziĝan solenon de Hu Ĉuankuj, oni alivestis la resaniĝintajn kamaradojn kiel servantojn kaj ilin enkondukis en la ceremoniejon. Kune kun trupo de la Nova Kvara Armeo, ili fine sukcesis ekstermi la armitajn reakciulojn.

Ĉi sube estas la IV-a sceno de la opero, kiu montras al ni, kiel saĝe kaj trankvile Bofranjo Aking luktas kontraŭ la stabestro de la banditaro.

La IV-a Sceno

Saĝo kontraŭ Ruzo

Personoj

AVINO ŜA: kontraŭjapana aktivulino en Ŝagiabang, 55-jara.

BOFRANJO AKING: 30-jara, kompartianino, subtera interligantino.

KILONG: filo de avino Ŝa, 17-jara.

AVO KI: revolucia nepartiano, 62-jara.

DIAŬ HIAŬSAR: fripono.

ADJUTANTO LIU: adjutanto de la pupa “Lojala Patriota Armeo”.

HU ĈUANKUJ: komandanto de la pupa “Lojala Patriota Armeo”.

DIAŬ DEJI: stabestro de la pupa “Lojala Patriota Armeo”.

TIAN ĜIGIU: servsoldato en la pupa “Lojala Patriota Armeo”.

* * *

Post tritaga “balaado” la japana armeo sin retiris de Ŝagiabang.

Printempo-tetrinkejo. Ordinara tetrinkejo en suda Ĉinio. Ĝi staras ĉe la albordiĝejo de la lago. Tri-

ĉambra kabano kun alkonstruita sunŝirma tegmento ekstere, sub kiu lokiĝas kelkaj tabloj por la gastoj. Oni povas vidi teujojn, tasojn, sitelojn ktp. kaj bambuan ĉapelon pendantan ĉe la fenestro.

Kiam leviĝas la kurteno, gevilaĝanoj trapasas la scenejon unuj post aliaj. Ili revenas de rifuĝado.

KNABINO: Panjo, sidiĝu ĉi tie kaj iom ripozu.

MEZAĜA VIRINO: Ne, mi ne lacas. Prefere ni tuj iru hejmen por pririgardi. (Ili eliras kune.) (Bofranjo Aking venas el la domo.)

BOFRANJO AKING (kantas laŭ “sipisanban”*):

Tri tagojn “balaadis” la japanoj,

Forlasis ili la vilaĝon ĉi-matene.

Revenas jen la rifuĝintaj samlokanoj.

Do 1’ karajn kamaradojn mi reportu reme.

(Envenas Avino Ŝa kaj Kilong.)

AVINO ŜA: Bofranjo Aking!

BOFRANJO AKING: Vi venas!

KILONG: La japanaj diabloj jam foriris, do oni devas revenigi la vunditajn kamaradojn!

* Unu el la ofte uzataj arioj en la Pekina Opero.

BOFRANJO AKING: Jes! Kilong, iru pretigi boatojn. Ni tuj ekveturu! (*Ŝi intencas tuj foriri.*)
(*Avo Ki alrapidas.*)

AVO KI: Bofranjo Aking, la trupo de Hu Ĉuankuj venas en la vilaĝon.

BOFRANJO AKING: Hu Ĉuankuj alvenas! Tuj post la foriro de la japanoj! Kial tiel rapide? (*Al Avo Ki.*) Ĉu vi vidis lian trupon?

AVO KI: Jes! Kun centoj da viroj!

BOFRANJO AKING: Centoj da....

AVO KI: Sur ilia standardo skribiĝas "Lojala Patriota Armeo" kaj sur la ĉapoj ili portas kokardon kuomintangan.

BOFRANJO AKING: "Lojala Patriota Armeo", kokardo kuomintanga....

AVO KI: Oni diris krome, ke ankaŭ Diaŭ Deji revenas kune....

AVINO ŜA: Diaŭ Deji....

KILONG: Li ja estas mordema vipuro de nia loko!

BOFRANJO AKING: Ĉar Hu Ĉuankuj alvenas kaj ni ankoraŭ ne scias, ĉu li nur trapasos aŭ longe restos ĉi tie; ni prefere ne reveturigu la malsanajn kamaradojn, sed anstataŭe portu al ili sekajn mangĝaĵojn.

AVO KI: Mi iru prepari bakitan riz-farunon!

KILONG: Mi iru pretigi boatojn!

BOFRANJO AKING: Estu singardemaj!

(*Avo Ki elrapidas. Bofranjo Aking iras en la kabanon. Kilong kaj Avino Ŝa intencas eliri, kaj subite eliras aliveje ŝajne vidinte, ke la trupo de Hu Ĉuankuj envenas. Kelkaj soldatoj el la "Lojala Patriota Armeo" alvenas de la vilaĝo traserĉante kaj forpasas. Diaŭ Hiaŭsar en uniformo de la "Lojala Patriota Armeo" envenas kuntrenante Avon Ki.*)

DIAŬ HIAŬSAR: Nu, venu maljunulo Ki! Mi ja estas vin serĉanta!

AVO KI: Por kio?

DIAŬ HIAŬSAR: Ĉu vi ne estas la funkciulo de la vilaĝo?

AVO KI: Jes.

DIAŬ HIAŬSAR: Bele vi prosperis! Kaj impostoj kaj kontribuajfoj ĉio devas trapasi viajn manojn. "Pro akvo trafluanta malsekiĝas tero, grasiĝas la perantoj pro peradafero." Ne eblas ke vi ne akiris vian parton, ĉu ne?

AVO KI: La samlokanoj min elektis por la servo, mi ja nur uzas miajn kruojn.

DIAŬ HIAŬSAR: Nu, bone! Ĉar nun ni venas, do vi devas bone provizi nin!

AVO KI: Unuj foriris, aliaj alvenas, ja estas malfacile por la vilaĝanoj! Estu indulgaj al ili!

DIAŬ HIAŬSAR: Sensencaĵo! Faru laŭ via plaĉo! Gardu viajn ostaĉojn, se io iom mankus!

AVO KI: Nu, mi faros mian eblon. (*Indigne li eliras.*)

DIAŬ HIAŬSAR: Maljunulaĉo! (*Al la domo.*) Teon! Mia moŝto soifegas de irado! Tuj! Rapidu! He, diablo prenu, rapidu ja! (*Li ekfrapas sur la tablo kaj rondigas siajn okulojn.*)
(*Bofranjo Aking elvenas el la domo.*)

BOFRANJO AKING: Ĉar la japanoj ĵus foriris, mi ankoraŭ ne alportis akvon, nek faris fajron en la

forno. Se vi volas teon, ankoraŭ iom atendi vi devas.

DIAŬ HIAŬSAR: Kiom longe?

BOFRANJO AKING: Mi ne estas certa pri tio.
(*Parolante ŝi ordigas la tetrinkilaron.*)
(*Envenas adjutanto Liu.*)

DIAŬ HIAŬSAR: Do vi intence sabotas! Videble, oni devas instrui al vi, kiel respekti al homoj.
(*Li malligas sian zonon kaj intencas ŝin ekbati.*)

ADJUTANTO LIU (*intence montras favoron*): Ĉesu! Diaŭ Hiaŭsar! — Saluton, Bofranjo Aking!

BOFRANJO AKING: Ha! Estas vi, sinjoro adjutanto Liu. Do vi revenas por loĝi ĉi tie?

ADJUTANTO LIU: Jam du jarojn ni ne vidis unu la alian, kiel vi fartas? Diaŭ Hiaŭsar! Kion vi faracas ĉi tie kontraŭ nia propra homo?

BOFRANJO AKING: Vidu jen! Tiu ĉi frato, ne rekonata de mi, eble neniam vidita antaŭe, ne havas indulgemon por mi!

ADJUTANTO LIU (*tiras Diaŭ Hiaŭsar al si*): Kia blindulo vi estas, Diaŭ Hiaŭsar! Ŝi estas la vivsavinto de Lia Komandanta Moŝto! Se Lia Komandanta Moŝto eksciis, ke vi faris maldecaĵon al ŝi, ĉu ian bonon vi povus rikolti?

DIAŬ HIAŬSAR: Kiel mi povus tion scii! Min pardonu komprene, Bofranjo Aking! Mi ja estas tro stulta por ekkoni noblan homon kia vi, dum vi estas grandanima kiel ĉefministro.

BOFRANJO AKING: Ne grave. Unuafoje fremdulo, duafoje jam konatulo. Mi ja ne estas homo, kiu malbonuzas la influon de potenculo, mi nek faras kaŝdenuncon. Sinjoro Liu, via adjutanta moŝto ja tion scias!

ADJUTANTO LIU: Bofranjo Aking estas tre bonkora. Nu, iru! (*Okulsignante al Diaŭ Hiaŭsar.*) Iru for, tuj jam for!

DIAŬ HIAŬSAR: Jes! Ĝis revido, Bofranjo Aking!
(*Li eliras.*)

BOFRANJO AKING: Sinjoro adjutanto, sidiĝu! Mi alportos teon al vi, tuj kiam la akvo boliĝos. Ja tre malofte mi havas la honoron vin priservi en la teejo.

ADJUTANTO LIU: Ne ĝenu vin, Bofranjo Aking. Mi venas nur por vin saluti laŭ la ordono de la komandanto. Kaj Lia Komandanta Moŝto mem venos baldaŭ poste.

BOFRANJO AKING: Komandanto?

ADJUTANTO LIU: Tio estas sinjoro Hu.

BOFRANJO AKING: Ĉu temas pri taĉmentestro Hu?

ADJUTANTO LIU: Nun li jam fariĝis komandanto! Kun pli multe da viroj kaj pafiloj, li jam multe pli prosperis kaj potenciĝis ol antaŭe! Kun ĉaspafilo hieraŭ, sed kun revolvero hodiaŭ!

BOFRANJO AKING: Ha! Bone do! Ho, sinjoro Liu, vi forestis jam du jarojn, kiel rapidas la tempo! Mi esperas, ke ĉifoje vi pli longe loĝos ĉe ni.

ADJUTANTO LIU: Ĉifoje ni jam ne forlasos vin.

BOFRANJO AKING: Ne foriros? Bone do! Ni ja esperas, ke vi longe vivos ĉi tie.

ADJUTANTO LIU: Nia trupo loĝados ĉi tie. La ĉefstabejo havos lokon en la domo de Lia Stabeŝtra Moŝto Diaŭ, kaj oni jam iris ordigi la ĉambrojn!

La komandanto diris, ke li unue venos al la tetrinkejo.

TIAN ĜIGIU (*krias post la kuliso*): Alvenas Lia Komandanta Moŝto!

(*Tian Ĝigu kaj kelkaj pafiltenantaj pup-armeoj envenas. Poste envenas Hu Ĉuankuj kaj Diaŭ Deji.*)

HU ĈUANKUJ (*kantas laŭ "sipijaŭban"**):

Je revido de 1' konata loko ĝojas mia koro.

DIAŬ DEJI (*kantas laŭ la sama melodio*.)

Jen revenas la hejmlokon mi kun granda gloro.

HU ĈUANKUJ: Kiel vi fartas, Bofranjo Aking? Kredeble bone prosperas via entrepreno?

BOFRANJO AKING: Ho, sinjoro komandanto! Kia favora vento vin alblovigis ĉi tien! Dank' al via beno, mi vivas ankoraŭ tolereble.

HU ĈUANKUJ: Nu, venu, mi prezentu al vi mian stabestron Diaŭ, filo de la ĉiloka bienulo sinjoro Diaŭ. Li nomiĝas Diaŭ Deji.

BOFRANJO AKING: Saluton, sinjoro stabestro! Mi profitas la favoron de via bona loko por perlabori miajn vivbezonojn. Mi esperas, ke mi trovos ŝirmon sub la granda arbo de Via Stabestra Moŝto.

HU ĈUANKUJ: Jes, Lia Stabestra Moŝto ja devas ne ŝpari favoron al vi.

DIAŬ DEJI: Komprenoble.

HU ĈUANKUJ: Kie estas Aking?

BOFRANJO AKING: Aj, lasu lin! Li kverelis kun mi kaj kolere foriris!

HU ĈUANKUJ: A, kio? Ja bele vi kunvivis, ĉu ne? Li estas nur iom migrema kaj ne ŝatas longe restadi hejme.

BOFRANJO AKING: Jes, tio estas la kaŭzo. Mi diris al li, ke ne konvenas, ke li ĉiam tiel vagadas kun birdkaĝo enmane kaj lasas la tetrinkejon sub la zorgo de mi sola! Li koleriĝis kaj foriris.

HU ĈUANKUJ: Kien li iris?

BOFRANJO AKING: Oni vidis, ke en Ŝanhajo li faras negocadon en solo. Li diris, ke li ne revenos hejmen antaŭ ol grandan prosperon li atingos.

HU ĈUANKUJ: Bone! La viro ja devas havi sian ambicion.

BOFRANJO AKING: Ej, vi eĉ lin laŭdas!

HU ĈUANKUJ: Bofranjo Aking! Hodiaŭ mi povas atingi la prosperon nur dank' al la saviĝo el la vivdangero, kion mi ja ŝuldas al vi!

BOFRANJO AKING: Ne diru! Tion difinis ja via propra Fortuno. Ha, pro la babilemo, mi lasis vin longe sidi sen teservo. Nu, mi iru infuzi teon por vi. Jen Via Komandanta Moŝto venas kiel diras la proverbo: La fluoj enmariĝas je la fino, la homoj renkontiĝas laŭ destino! (*Ŝi eniras la kabanon.*)

HU ĈUANKUJ: Sinjoro adjutanto Liu, iru aranĝi la ĉefstabejon!

ADJUTANTO LIU: Jes!

DIAŬ DEJI (*longe observinte Bofranjon Aking*): Sinjoro Komandanto! Kiu estas la virino, tiel bone konata de vi?

HU ĈUANKUJ: Ĉu vi demandas pri ŝi? (*Li kantas laŭ "erliuban"*.*)*

Antaŭ tri jaroj, kiam mi komencis ludi per pafiloj,

Ĉe mi troviĝis nur dekkelkaj viroj kaj sep-ok fusiloj.

Hazarde ni renkontis la Mikad-armeon,**

Kaj devis pafi por eviti mem pereon.

Por tiu kolizi' ĉe Jangĉeng-lago,

Multaj vundoj kaj mortoj estis nia pago.

Nin persekuti la japanoj tiam penis,

Do mi, por min forsavi tien ĉi alvenis.

Bofranjo Aking, brava, ho anĝelo,

Sagace kaŝis min en sia akv-barelo.

Per teo ŝi 1' japanojn servis tre trankvile,

Por trompi ilin kaj min savi lud-simile.

Ĝismortan dankon mi gravrosen memoro, (*Bofranjo Aking elvenas kun tekruĉo.*)

Por esti inda en la rondo de bravuloj, tintsonora, brilhonora!

BOFRANJO AKING: Tia bagatelajo ja ne indas vian komplezon ĝin menciadi. Cetere sagaco venis al mi nur sub la pelo de urĝeco, kaj mi mem terurigiĝis post la paso de la afero. (*Verŝante teon.*) Sinjoro Komandanto, via brava luklado kontraŭ la japanaj diabloj estas ankoraŭ laŭdata de la popolanoj en kantrakontoj!

HU ĈUANKUJ: O!

BOFRANJO AKING: Bonvolu preni teon, sinjoro stabestro. (*Ŝi eniras la kabanon.*)



** La japana armeo.

DIAŬ DEJI (*rigardante al la dorso de Bofranjo Aking kantas laŭ "sipiliuŝuj"**):

Mi naskiĝis ja en Ŝagiabang-vilaĝo,
Loĝadis en ĝi jam de 1' infanaĝo,
Kaj ĉiujn vilaĝanojn mi tre bone konas;
Sed kial pri 1' mastrin' mi ne memoras?

HU ĈUANKUJ (*kantas laŭ la sama melodio*):

Dektrian de aŭgusto, kiam kanonpafoj muĝis,
Kun la familianoj suden vi rifuĝis.
Nur tiam ŝi kaj ŝia edzo venis,
Kaj tevendadon ili entreprenis.

Se vi ne havis ŝancon eĉ ŝin vidi,
Kiel do povus la memor' vin gvidi?

(*Djaŭ Deji paŝis al la pordo de la domo por ŝtele enrigardi, dume elvenas Bofranjo Aking kun tekruĉo en la mano.*)

DIAŬ DEJI (*kantas laŭ "sipijaŭban"**):

Tre neordinara estas tiu ĉi virino.

BOFRANJO AKING (*kantas alterne laŭ la sama melodio*):

Ja kia ruzo kaŝas sin en lia sino?

DIAŬ DEJI (*kantas alterne*):

Ŝi havas lertan langon kaj akran vidon.

BOFRANJO AKING (*kantas alterne*):

Sub ruza rid' li kovas danĝeran insidon.

DIAŬ DEJI (*kantas alterne*):

Nek arogante nek humile ŝi sin tenas.

BOFRANJO AKING (*kantas alterne*):

Li sian veran penson kaŝi penas.

DIAŬ DEJI (*kantas alterne*):

Per kiu vent' ŝi velas? Kiun vojon prenas?

BOFRANJO AKING (*kantas alterne*):

Ĉu al Ĉiang-aŭ Vang-klik' li apartenas?

DIAŬ DEJI (*kantas alterne*):

Mi kaŝe kaj tre lerte ŝin spionos.

BOFRANJO AKING (*kantas alterne*):

Mi grandan singardemon kontraŭ li bezonos.
(*Ŝi intencas eliri.*)

DIAŬ DEJI: Bofranjo Aking! (*Li kantas laŭ "sipiliuŝuj"**):

Ĵus Lia Komandanta Moŝto laŭdis vin.

Bofranjo Aking estas vere mirvirin'!

Mi admiregas, ke en vivdanĝer' trankvile
Vi trompis la japanojn tre facile.

Se patriotan devkonscion vi ne havus,

La vivon vi ne riskus kaj lin lerte savus!

BOFRANJO AKING (*kantas alterne*):

Min ne tro laŭdu Via Moŝto Stabestra.

Ne nomu ĝin malegoism' humana.

Por ke prosperu la trinkej' sukcese,

Por ni helpdoni al klient' estas necese.

La Komandanto estas nia klient' fidela,

Kial ni prenu lin ne kiel gardanĝelon?

Lia propra fortuno mem lin benis.

Tial ja la danĝero pasis, kaj feliĉo venis.

DIAŬ DEJI (*kantas daŭre*):

L' Armeo Nova Kvara longe garnizonis

Ĉi tie, ĝi sendube grandan gardon donis.

Kaj ĝiaj anoj ofte gastis ĉe vi, certe,

Kredeble ilin servis vi pli zorge, lerte!

BOFRANJO AKING (*kantas daŭre*):

Per fajro de brulligno el diversaj montoj

Boligas ni la akvon de malsamaj fontoj.

Por niaj tabloj estas ĉiam ja bonvenaj

Klientoj ĉiuj niaj plej diversdevenaj.

Kaj ĉiujn gastojn, kiuj venas por tetrinko,

Afable servas ni ja tute sen distingo.

Kaj ĉiun ni akceptas ĉiam kun ekrido.

Negocon oni finas kun la kont-likvido.

Post la forir' de 1' gasto ĉesas te' vapori:

Pri kia plia zorgo povus vi paroli?

DIAŬ DEJI (*ridas ruze*): Hehehehe! Bofranjo Aking
ja estas vera mastrino de tetrinkejo, kiu scias paroli
sen ellasi eĉ gutetojn! Vere admirinde por mi!

BOFRANJO AKING: Sinjoro Ĉefkomandanto, kion
tio signifas!

HU ĈUANKUJ: Tia strangulo li estas! Ne ĝeniĝu
pro liaj vortoj!

BOFRANJO AKING: Do nenio! (*Ŝi eniras la
kabanon.*)

HU ĈUANKUJ: Pro kio do, mia amiko? Ĉu vi
eĉ havas ian suspekton pri ŝi?

DIAŬ DEJI: Sinjoro komandanto! Tiu ĉi Bofranjo
Aking havas akrajn okulojn kaj orelojn, grandan
kuraĝon kaj viglan gardemon, kaj ŝi povas sin teni
trankvile en danĝero. Se ni volas longe stari en
Ŝagiabang kaj agi laŭ la ĉirkaŭira nacisava linio,
ni ja bezonas tian homon. Sed mi ne scias, ĉu ŝi
estas unuanima kun ni?

HU ĈUANKUJ: Bofranjo Aking? Certe ŝi estas nia
homo!

DIAŬ DEJI: Do oni povus ŝin demandi pri la Nova
Kvara Armeo. Ŝi certe povas doni informojn pri
ĝi. Sed mi timas, ke ŝi tion ne faros al ni.

HU ĈUANKUJ: Por ke ŝi donu informon, prefere
mi ŝin demandu. Ĉar vi ne povus sukcesi en tio!
(*Bofranjo Aking elvenas kun telero da bakitaj melonsemoj en la mano.*)

DIAŬ DEJI: Jes ja! Certe Via Komandanta Moŝto
estas pli respektata!

BOFRANJO AKING (*flanke al si mem*): Hm, la
sentaŭgulon li elŝovas! (*Al Hu Ĉuankuj.*) Sinjoro
komandanto, bonvolu gustumi melonsemojn. Nun
la teo eble jam komencas gusti plaĉe!

HU ĈUANKUJ: Jes, jes, nun ĝi komencas plaĉe
gusti! Bofranjo Aking, ĉu mi povus peti de vi
informon...

BOFRANJO AKING: Ĉion, kion mi scias....

HU ĈUANKUJ: Diru, ĉu la Nova Kvara Armeo...

BOFRANJO AKING: Nu, pri la Nova Kvara Armeo.

Jes, jes. (*Ŝi kantas laŭ "sipijaŭban"**):

Enketon Via Moŝto ne bezonas entrepreni,

Ja multaj viroj de 1' Nova Kvara Armeo loĝis ĉe ni.

HU ĈUANKUJ: Se ili ĉi tie loĝis, ĉu ne troviĝis mal-
sanuloj kaj vunditoj inter ili?

BOFRANJO AKING (*kantas daŭre*):

Kaj inter ili ne-malmultaj armeanoj

Suferis de diversaj vundoj aŭ malsanoj.

HU ĈUANKUJ: Kie ili loĝis?

BOFRANJO AKING (*kantas daŭre*):

En ĉiu domo de vilaĝo nia,

Ja senescepte loĝis hom' ilia.

Kaj nian tetrinkejon ili ofte venis

Por trinki teon, lavi manojn aŭ bolakvon preni.



HU ĈUANKUJ (*al Diaŭ Deji, kontente*): Ĉu vi aŭdis, nu?

DIAŬ DEJI: Kie ili estas nun?

HU ĈUANKUJ: Jes, diru, kie ili estas nun?

BOFRANJO AKING (*kantas daŭre*):

Aŭdiĝis iu-tage kolektiĝ-ordono,
Formarŝis tiam ili en longa kolono!

HU ĈUANKUJ

DIAŬ DEJI (*samtempe*): Ĉu ankaŭ la vunditoj kaj malsanuloj?

BOFRANJO AKING (*kantas daŭre*):

Jes, ankaŭ la vunditaj kaj malsanaj feblaj.
Jam foraj ili estas, ne plu retroveblaj!

DIAŬ DEJI: Ĉu ĉiuj?

BOFRANJO AKING Jes, ĉiuj!

HU ĈUANKUJ: Strange! La japanoj ilin atakis de tri flankoj ferminte ĉiujn landajn kaj akvajn vojojn per tavolo post tavolo da soldatoj, kaj lasis al ili nur unu vojon. Kaj ni ilin atendis la tutan nokton oriente de la ponteto. Kial ni vidis neniun el ili?

BOFRANJO AKING: O, sinjoro komandanto, se vi postenis oriente de la ponteto, ĉu vi ne renkontis la japanojn kiuj devis trapasi tie?

HU ĈUANKUJ: La japanojn ni ja renkontis!

BOFRANJO AKING (*flanke al si mem*): Kial ili ne batalis je renkontiĝo? Hm, certe ili interligiĝis en komploto. (*Al Hu Ĉuankuj*) Sinjoro komandanto, ĉu tie ĉi ankoraŭ okazos batalo? Ĉu la japanoj eble revenos? Sciu, ke la kampoj jam dezertiĝis pro rifuĝado de la loĝantoj. Kaj ankaŭ mia malgranda tetrinkejo ja ne povos elteni ripetitajn frapojn!

HU ĈUANKUJ: Trankviligu la vilaĝanojn! La japanoj jam ne revenos, se nur mi Hu Ĉuankuj restos ĉi tie.

BOFRANJO AKING (*flanke al si mem*): O, la japanoj ne revenos! Do ili jam kaŝe faris interkonsenton! (*Al Hu Ĉuankuj*) Sinjoro komandanto, pro kio vi demandis pri la vunditoj kaj malsanuloj de la Nova Kvara Armeo?

HU ĈUANKUJ: Ni deziras ilin...

DIAŬ DEJI: Jes, ni deziras ilin kredigi, ke ni estas kontraŭ japanaj same kiel ili, do ni estas amika trupo por ili. Nun ili estas en malfaciloj havante nek kuraciston nek medikamentojn por sin kuraci. Ni deziras ilin helpi. Ĉu ne, sinjoro komandanto?

HU ĈUANKUJ: Jes, jes!

BOFRANJO AKING: Ho, bedaŭrinde ili jam estas for kaj ne povas ĝui la korfavoron de Via Stabestra Moŝto. Se ili ne estus foririntaj, kiel povus okazi, ke la japanoj ne povis

eltrovi ilin per tri-taga kombado tra nia vilaĝo!

DIAŬ DEJI: Hehehe! Fremduloj estas la japanoj, kaj ili konas nek la homojn nek la lokon. Ĉu ne estas tre facile kaŝi kelkajn homojn sub iliaj blindaj okuloj en loko tiel vasta kiel Ŝagiabang! Ekzemple, sinjoro komandanto ja estis foje kaŝita de vi en akvobarelo ĝuste sub la nazo de la japanoj kaj vi sukcesis! Hehehehe!

BOFRANJO AKING: A, do vi volas diri, ke estas mi, kiu kaŝis la vunditojn kaj malsanulojn de la Nova Kvara Armeo! Juĝu tamburon laŭ la sono, diron komprenu laŭ la tono—sinjoro komandanto, laŭ li, mi devus esti vin ne savinta, por ke mi ne estu suspektata!

HU ĈUANKUJ: Bofranjo Aking, tion ne...ne...ne...

BOFRANJO AKING: Ne, ne, ne, sinjoro komandanto! Estas bone, ke viaj viroj faru detalan traserĉon interne kaj ekstere de mia malgranda tetrinkejo dum via ĉeesto! Por ke oni ne min suspektu kaj ke mi povu liberiĝi de ĝenoj en niaj interrilatoj!

HU ĈUANKUJ: Vidu, kion vi faris, sinjoro stabestro! (*Al Bofranjo Aking*) Bofranjo Aking, estu trankvila! Ni, kiel fratoj en societo, fidele observas justecon! Kaj ne permesos al ni detrui la ponton post la paso de rivero kaj forgesi repagi la faritan bonon!

DIAŬ DEJI: Nur ŝercon mi faris, kial vi tion prenas serioze! Hehehehe....

HU ĈUANKUJ: Jes, jes, sinjoro stabestro tion diris nur ŝerce!

BOFRANJO AKING: Sed tia ŝerco estas tro peza por ni, sinjoro stabestro! (*Ŝi iras en la kabanon.*)

DIAŬ DEJI (*rigardante la dorson de Bofranjo Aking*): Hehehehe.... (*Sin turnante al Hu Ĉuankuj*) Komandanto! Mi opinias, ke la vunditoj kaj

malsanuloj de la Nova Kvara Armeo certe ne foriris, sed restas ne-malproksime!

HU ĈUANKUJ: Kie do?

DIAŬ DEJI (*montrante al la fragmitejo*): Kredeble tie, en la fragmitejo.

HU ĈUANKUJ: En la fragmitejo? Jes, venu!

(*Diaŭ Hiaŭsar kaj Tian Ĝigiu envenas.*)

HU ĈUANKUJ: Faru traserĉon tra la fragmitejo!

DIAŬ DEJI: Tio ne taŭgas! Huĉjo, vi ne estas ĉitieano kaj ne bone konas la fragmitejon. La fragmitejo estas tre vasta kun topografio tre komplika. Tia klopodo similus al serĉado de kudrilo en la maro. Kaj krome, ili estas en sia kaŝejo dum ni devus nin montradi sub iliaj okuloj por ricevi de ili pafojn. Kvankam ni devas plenumi la taskon asignitan de la japanoj, tamen ni ne faros tian malprofitan negocon!

HU ĈUANKUJ: Kion ni faru do?

DIAŬ DEJI: Igu la malsanulojn mem sin malkaŝi!

HU ĈUANKUJ: Ĉu ili memvole sin malkaŝos? Ne diru sensencaĵon!

DIAŬ DEJI: Ideon mi havas por tion efektiviĝi! Diaŭ Hiaŭsar, kunvoku la loĝantojn, ke ili kolektiĝu malantaŭ la tetrinkejo! Mi faros paroladon al ili!

DIAŬ HIAŬSAR: Jes! (*Li eliras.*)

HU ĈUANKUJ: Por kio kunvenigi la loĝantojn?

DIAŬ DEJI: Por ke ili iru fiŝkapti sur Jangĉeng-lago!

HU ĈUANKUJ: Fiŝkapti—do tiklas al vi la frandemo?

DIAŬ DEJI: Ni sendu sur ĉiujn boatojn niajn virojn en civilaj vestoj. Se la vunditoj kaj malsanuloj vidos, ke la vilaĝanoj venas fiŝkapti, ili pensos, ke jam repaciĝis en la vilaĝo, do ili mem venos el la fragmitejo. Tiam, ĉiuj boatoj ekpafos, kaj...

HU ĈUANKUJ: Hahaha! Bonajn ideojn vi ja havas, Diaŭĉjo!

(*Post la kuliso aŭdiĝas bruoj kaj voĉoj de vilaĝanoj, kiuj pli kaj pli proksimiĝas.*)

(*Diaŭ Hiaŭsar envenas.*)

DIAŬ HIAŬSAR: La loĝantoj alvenas.

DIAŬ DEJI: Diru al ili ke mi faros parolon.

DIAŬ HIAŬSAR: Silenton! La stabestro parolos al vi.

DIAŬ DEJI: Samlokanoj! Ni estas la “Lojala Patriota Armeo”, armeo batalanta kontraŭ la japanaj invadantoj! Alveninte, ni eksciis, ke vi estas en mizero kaj havas nenion por montri al ni vian bonvenigon. Pri tio ni estas tre komprenemaj. Vi tamen devas iri en la lagon por kapti fiŝojn kaj kankrojn, kaj ni ilin aĉetos laŭ la merkataj prezoj! (*Bruo inter la popolamaso: “Ni ne iros! Ni perdos niajn vivojn, se ni renkontos la japanajn motorboatojn!...”*)

DIAŬ DEJI: Nu, ne bruu, ne timu, ni sendos po tri virojn sur viajn boatojn por vin protekti!

(*Bruo de la popolamaso: “Ni ne iros! Ne! Ni tenos nian vivon por ankoraŭ iom manĝi!”*)

HU ĈUANKUJ: Diablo prenu, kiu kuraĝus ne iri! Mi mortpafos la neobeantojn! (*Diaŭ Deji kaj Hu Ĉuankuj eliras. Bofranjo Aking haste venas el la domo, kaj turnas sian rigardon al la vilaĝanoj post la domo.*)

BOFRANJO AKING (*kantas laŭ “sipisanban”*):

Kruelas lupoj, kaj vipuroj, skorpioj venenas,

Sed pli malice Diaŭ Deji sin tenas.

Li teksis ruzon kaj kaptilon faris.

Sed niaj homoj ne al tio sin preparis.

Se nur la fiŝboatoj reme ekveturos,

Danĝer’ fatala ĉe la fragmitej’ teruros.

(*Post la kuliso, la amaso bruas kaj la puparmeanoj klopodas ilin obeigi.*)

BOFRANJO AKING (*kantas daŭre*):

Se l’ vilaĝanoj la ordonon malobeus, Sangverŝus ili kaj eĉ forpereus.

Ne eblas al mi flugi al la fragmitejo senflugile...

Ho, en konfuzo mia tuta koro brulas maltrankvile.

(*Bruo post la kuliso. Aŭdiĝas krio de puparmeano: “Se vi ne iros, mi pafos!”*)

BOFRANJO AKING: Pafos! (*Kantas ŝi laŭ “kuajban”*):

Se sur la bordo oni pafojn faros,

La sonoj niajn homojn jam alarmos.

Tiam danĝeron ili certe eldivenos,

Ankoraŭ pli profundan kaŝon entreprenos.

Ili pafu!—Ho ideon mi jam havas! (*Ŝi deprenas sian ĉapelon, ĝin metas sur kruĉon, kaj kantas daŭre*):

Mi agu lerte kaj aplombe,

Kaj logu ilin al pafado trompe!

(*Bofranjo Aking jetis la kruĉon kun la ĉapelo en la lagon, kaj poste ŝi tuj rapidis en la domon. Diaŭ Hiaŭsar enkuras.*)

DAIŬ HIAŬSAR: Iu saltis en la akvon!

(*Hu Ĉuankuj kaj Tian Ĝigiu enrapidis.*)

HU ĈUANKUJ: Diablo lin prenu, li intencas naĝi al la fragmitejo! Pafu!

(*Tian Ĝigiu faris kelkajn pafojn sinsekve. Ankaŭ Hu Ĉuankuj aldonis kelkajn pafojn al la ĉapelo. Poste Diaŭ Deji envenas haste.*)

DIAŬ DEJI: Ne pafu! Ne pafu! Ho ve!

HU ĈUANKUJ: En la fragmitejo certe troviĝas la vunditoj kaj malsanuloj, alie, kial oni naĝas tien?

Niaj viroj tuj enboatiĝu kaj devigu la vilaĝanojn remi en la fragmitejon!

TIAN ĜIGIU: Jes! (*Li jam intencas eliri.*)

DIAŬ DEJI: Revenu! Disigu la loĝantojn!

(*Tian Ĝigiu eliras jesante.*)

HU ĈUANKUJ: Kial do nun disigi ilin?

DIAŬ DEJI: Sinjoro! Se oni tiel multe pafis en la vilaĝo, ĉu la rifuĝintoj en la fragmitejo, kiuj ne estas surduloj, ankoraŭ sin montros?

HU ĈUANKUJ: Kial vi ne avertis pli frue?

(*Tian Ĝigiu envenas.*)

DIAŬ DEJI: Diaŭ Hiaŭsar! Tuj surprenu civilajn vestojn kaj min atendu en la stabejo! (*Diaŭ Hiaŭsar eliras.*) Tian Ĝigiu! Sendu virojn por blokadi ĉiujn lokojn de kiuj oni povas veturi al la fragmitejo! Kolektu ĉiujn boatojn kaj ne lasu ilin moviĝi! Mortpafu ĉiun kiu intencos enlagiĝi! Mi tenados ilin en la fragmitejo kaj lasos ilin morti simple de malsato!

HU ĈUANKUJ: Bone! Se mi ne povus venki la malmultajn vunditojn kaj malsanulojn de la Nova Kvara Armeo, nomu min azeno! Ni iru al la stabejo!

—KURTENO—



SIMA VENSEN:

LAMPOLUMOJ

LA luno sin kaŝas. Nur kelkaj steloj dise trembrilas. La ĉielo ŝajnas pli alta kaj senfunda pro la eksterordinara stelbrilo.

La strato jam estas kvieta. La lasta trolebuso sin movas, preskaŭ malplena, kun nur kelkaj veturantoj. Ĉe la lasta haltejo jam viciĝis en longa linio pli ol dek trolebusoj kun estingitaj lampoj kaj fermitaj pordoj kaj fenestroj, kvazaŭ ili anoncus, ke jam estas tempo ankaŭ por ili ripozi: “Ĝis morgaŭ frumatene!”

Mi iras sur la kvieta strato. Turniĝinte sur branĉan vojon, mi min direktas rekte al mia hejmo. Ĉi tiu vojo estas nove asfaltita, ne sufiĉe larĝa, tamen tre ebena. Stratlampoj ankoraŭ ne instaligiĝis, tial la vojo povas vidiĝi nur dank’ al la stellumo, tamen, malgraŭ tio, mi paŝas sur ĝi kun plezuro... Antaŭ pli ol unu jaro, mi memoras, kiam mi transloĝiĝis en tiun ĉi novan loĝpunkton, ĉi tie ankoraŭ ne estis vojo, sed nur vasta maizkampoj, kie dense kreskis verdaj maizoj, fortikaj kaj altaj. Oni ne scias kiuj la unuaj ekhavis la ideon, ke, por iri de la nova loĝpunkto ĝis la trolebusa haltejo en pli mallonga tempo, estas preferinde trapasi la maizkampon. Tial vojo ekestis per la paŝado de iuj pasantoj. En la komenco ĉi tiun vojon iris nur tiuj, kiuj bone konas la situon de la kampo, kaj poste pli kaj pli multaj trapasis kaj sekve la vojo definitive formiĝis. Tamen la vojo ne estis glata kaj perfekta. Kota ĝi fariĝis, kiam pluva periodo venis. Neatendite venis termezuristoj kaj ankaŭ vojkonstruistoj. Sekve parto de la maizkampoj ŝanĝiĝis en glatan vojon. Ĉio iris en alta rapideco. Iuj diris kun admiro, ke niaj konstruistoj estas kvazaŭ iluziistoj, kiuj povas fari en momento mirindaĵojn. Denove mi ekmemoras la vortojn de sinjoro Lu Sin: “La vojo estiĝas per la paŝado de homoj.” En la malnova epoko ni devis havi novo-kreemon kaj la kuraĝon nin puŝi antaŭen, devis krei per paŝado vojon, kondukantan al feliĉo sur la senlime vasta tero. Nun estas nova epoko, tamen ni ankoraŭ devas havi entreprenemon esti kuraĝaj revii kaj krei. Se ĝustan vojlinion ni trovos, tiam la vojon pretigos vojkonstruaj maŝinoj.

Kun ĝojo mi iras renkonte al la lampolumoj brilantaj antaŭ mi. Ĉi tie, ĉe ni, la lampoj jam estas ne plu disaj kiel antaŭe. Kiel blindige helan lumon la maro da lampoj nun disverŝas!

La lampolumo min meditigis profunde.

Mi memoras, ke antaŭ kelkaj jaroj mi foje venis al Ŝanhajo. Ŝanhajo estas loko al mi ne fremda, ĉar tie mi vivis kaj batalis en la tridekaj jaroj de la kuranta jarcento kaj nun multaj el miaj malnovaj kunbatalantoj ankoraŭ estas tie. Mi trovis kamaradon Min. Kun glaso da teo kaj du cigaredoj ni ekparolis pri la pasinteco. Ankaŭ Min estis kvindekjara, tamen li ankoraŭ havis bonan memoron. Li diris: “Ĉu vi scias kiel ŝanĝiĝis la vivstato de la laborista loĝkvartalo, kie ni laboris kune, fraĉjo?” Mi respondis: “Kiel mi povus, kiam

mi loĝas ne en Ŝanhajo?” Li diris: “Iru do por rigardi! Mi kondukos vin.”

Min bone konis mian animstaton. Li sciis, ke, revidinte Ŝanhajon post la longa foresto, mi jam vane serĉis dum du tagoj la lokojn, kie mi travivis ne mallongan suferplenan tempon.

Kun pasintserĉemo mi ekiris kun Min. Ni vizitis la lokojn, kie ni iam faris subteran laboron. Tutan tagon mi iradis tra la kvartalo sed nenion povis rekoni. Dank’ al la klarigoj fare de Min fine mi sukcesis ion rekoni. Ĉu tie en la pasinteco ne estis la surtera infero, kie regis malriĉeco, malpureco kaj interpremiĝeco? Sed nun tie estas nova vilaĝo bela, kun asfaltita strato ambaŭflanke borderita per graciaj salikbranĉoj, sin malsupren klinantaj, pli ol cent etaĝdomoj loĝataj de homoj, kiuj en la pasinteco estis ŝirmataj per la t.n. “loĝejoj por laboristoj”, t.e. kabanoj konstruitaj el ferlatoj kaj kartonoj; grandioza laborista klubo; bone instalitaj infanvartejoj, infanĝardenoj, elementaj lernejoj kaj liceo; diversaj servaj instalaĵoj. Ĉu ĝi estas simpla loĝpunkto? Moderna urbeto ĝi ja estas! Kiam mi foriris de ĝi, nin adiaŭe salutis hela lampolumo. Min diris: “Diru, kiom granda ŝanĝiĝo okazis?” Mi respondis: “Surtera edeno!”

Ĉi tiu vizito min profunde impresis. Ekde tiam mi ofte ĝin preparolis kaj sopiradis al la loko. Ĉiufoje, kiam ekmemoris ĝin, mi pensis, ke, feliĉa mi estus, se mi povus fariĝi loĝanto de tia nova vilaĝo.

Finfine mi fariĝis loĝanto de tia nova vilaĝo, kiu estas ne en Ŝanhajo, sed en Pekino. Kiam mi transloĝiĝis en la novan loĝpunkton, ĉi tie estis nur iom pli ol tridek etaĝdomoj, grenplantoj ankoraŭ kreskis sur la kampoj ĉirkaŭ ili kaj la vojo ankoraŭ estis malglata. Sed la loĝantoj jam diris: “Kiel mirinda atingo. Origine ĉi tie estis nur tombejo ekster homa zorgo.” Vere tiel estis. Ĉiufoje, kiam mi revenis de fremda lando, mi senescepte havis ion por primiri: pliaj vojoj nove konstruiĝis, ambaŭflanke kun verdaj arboj fortikaj kaj vivecaj, kaj sennombraj etaĝaj loĝdomoj leviĝis sur la liberaj kampoj. La etaĝdomo en kiu ankoraŭ regis kvieto en la antaŭa tago kiam ĝi estis transdonita al la uzantoj, nokte de la sekvanta tago ĝi jam estis brile iluminita. Infanoj ĝojkriis: “Jen alvenas novaj loĝantoj!” Ekster la loĝkvartalo estas pli da viveco: aŭtobusoj veturas sur la ŝoseo, kiu ĉirkaŭas la urbon; pliaj domegoj de superaj lernejoj estas finkonstruitaj. Ĉiuj tiuj ŝanĝiĝoj ĉiam min ĝojigas.

Foje mi akompanis amikojn el fremda lando por viziti iun lokon. Kiam ni staris antaŭ iu granda konstruaĵo, nun ĉe ni tre ordinara, mi diris al ili: “Ĉi tiu domego estas konstruita nur en tri monatoj.” Kun miro unu el ili diris: “Ĉu eble?” Poste li aldonis: “Ĉe ni eble tri jaroj estus necesaj!”

Estas nokto kvieta.

La tuta loĝpunkto kvazaŭ dormas, tamen lampolumoj ankoraŭ brilas el ĉiu domo. Kredeble malfrudormemuloj ankoraŭ ion lernas en lampolumo.



Rakonto

pri Dormo

EN 1951 agrara reformo komenciĝis en Fang-vilaĝo de Anhuĵ-provinco. La kamarado, kiu gvidis tie agraran reformon, havis familian nomon Deng kaj tieaj malriĉuloj ĉiuj familiare nomis lin Dengĉjo. Li havis apartan emon vizitadi malriĉulojn. Iutage, vizitante malriĉulojn en la okcidenta fino de la vilaĝo, li vidis strangan aferon: sub brika pordarko sidis knabino, vestita per ĉifonoj, kiuj estis kvazaŭ kunligitaj folioj. Ŝiaj okuloj ŝvelis tiel terure, ke ŝi apenaŭ povis ilin malfermi. Per siaj terure frostiĝintaj manetoj, kiuj similis al karotoj, ŝi tamen prikudris tolplandumon, kantetante:

*Arĝenta dormo, ora dormo,
Min ne kompatas la dormemo.
Pli frue mortu bopatrino,
Ke mi satdormu ĝis mateno!*

El la kanto Dengĉjo ekkomprenis, ke tiu ĉi knabino estas infanĉino*. Li pensis, ke estas senutile nur malbeni la bopatrinojn kaj ne partopreni en la klasbatalo. Li sciis, ke tie infanĉinojn povas havi nur la domoj de bienuloj, ĉar krom ili neniu kapablis pagi por tio. Li sciis ankaŭ, ke ili ĉiuj kutimas turmenti la infanĉinojn per bato kaj insulto kaj eĉ ilin mortigi. Tial, apenaŭ ŝi finis sian kanton, Dengĉjo tuj ŝin alparolis: "He, —"

La voĉo estis kaj mallaŭta kaj afabla, sed por la knabino ĝi estis kvazaŭ tondro el sennuba ĉielo. Ŝi rapideme kovris al si per la manoj la kapon kaj sin premis al la murangulo, rapide kante-

*Arĝenta dormo, ora dormo,
Min ne kompatas la dormemo.
Bonkora mia bopatrino
Prizorgas bone min kun peno.*

Fininte la kanton, ŝia korpo tremadis senĉese. Dengĉjo komprenis, ke ŝi erare prenas lin por sia bopatrino.

Guste en tiu momento alvenis la prezidantino de la loka Virina Asocio. Dengĉjo do diris:

"Kamaradino, ja ne sufiĉe bone plenumita estas nia laboro: ni preterlasis unu suferanton."

"Ho, ŝi, filino de la maljunulo Tian. Ŝi estas prenita de Senhaŭtigulo Vang kiel rentpago. Kruelege ŝia tigra bopatrino traktas ŝin. Ĉiutage ŝi estas devigata ellitiĝi tre frue en la mateno kaj enlitiĝi nur noktomeze. Pro la turmentado la antaŭa floranta knabino nun jam fariĝis skeleto."

Aŭdinte la vortojn de la prezidantino, la knabino diris singene:

"Ho, estas kamarado. Ĉu mi povus demandi vin pri iu afero?"

"Jes. Diru do!"

"Kamarado, la popola registaro, kiel mi scias, zorgas kaj pri loĝejoj kaj pri tero por la popolo. Ĉu ankaŭ pri dormo?"

La prezidantino ne povis deteni sin ekridi, sed Dengĉjo diris gravmiene:

"Ankaŭ pri tio. Prezidanto Maŭ diris, ke ĉiujn aferojn koncerne la liberigon de la malriĉuloj ni prizorgas senescepte."

"Mi do postulas iom da dormo."

"Ĝin vi havos. Por sia riĉiĝo la bienuloj avide suĉas la sangon kaj medolon de la malriĉuloj kaj ankaŭ senigas la malriĉulojn je dormo. Nun, vi iru al la Virina Asocio kune kun la prezidantino kaj dormu tie."

La knabino, fiksinte la kudrilon sur la tolplandumon, stariĝis kaj foriris kune kun la prezidantino. En la sidejo de la Virina Asocio la prezidantino pretigis liton por ŝi. Ŝi kuŝiĝis en la liton kaj tuj endormiĝis profunde. Ŝia bopatrino plurfoje intencis ŝin veki per kriadoj, sed ŝi estis forpelita de milicanoj. La knabino satdormis ĝis la tagmezo de la sekvinta tago. Vekiĝinte, ŝi frotis al si la okulojn, kiuj jam ne ŝvelis, ilin malfermis kaj ekvidis, ke Dengĉjo, paĉjo kaj la prezidantino ĉiuj estas antaŭ ŝi.

"Ha! kiel dolĉa dormo, paĉjo!" ĝojiĝis la knabino.

"Nevino, vi jam liberiĝis. Vi povas reveni al via patro. Ni donos al vi teron kaj domon," diris Dengĉjo.

"Bonege! Ĝuste tion mi deziras de multaj jaroj!" diris la patro de la knabino.


Poste la knabino revenis ĉe sian patron. Ŝi sate manĝis, komforte loĝis, bone sin vestis, sufiĉe dormis kaj ĝoje laboris. Ŝi vere suprenturniĝis. Neŝanĝebla estas ŝia kutimo kantadi, sed la vortoj de la kanto jam ne estas la samaj:

*Arĝenta dormo, ora dormo,
Mi dolĉe dormas post agrar-reformo.
Ja estas manĝo rizaĵ-krustoĉ,
Kaj estas homo ankaŭ infanĉin'.*
La granda Kompartio liberigis min.

†Iom karbiĝinta rizaĵo sur la fundo de kaldrono.



*Knabino el malriĉa familio, aĉetita de riĉulo por sklavservo kaj edziniĝo al lia filo post maturiĝo.



Angulo de Ciping, la centro de Ginggang-monto.

Ginggang-monto

Hodiaŭ

SONG GJUN

SOMERE de la pasinta jaro mi vizitis Ginggang-monton — la unuan bazlokon de la ĉina revolucio. Mi decidis tion fari por pilgrimi la revoluciajn memorindejojn de antaŭ pli ol tridek jaroj, kaj samtempe vidi kia nun fariĝis la montregiono kiu estis preskaŭ ekster trafikado.

LOKO KIE BATALIS LA RUĜA ARMEO

Trapasinte gubernion Tajhe la aŭto eniris la montregionon. La ŝoseo serpentumas ĉirkaŭ la montoj. Sur la montodeklivoj kreskas densaj arbaroj, kaj allogaj estas precipe la aroj kaj aroj de azaleoj inter la arbustaroj. Aliflanke de la ŝoseo murmuris monttorentoj.

Tieaj loĝantoj diris, ke antaŭ la konstruo de la ŝoseo, tie troviĝis nur kvin montvojetoj, sur kiuj eĉ puŝĉaro ne povis trafiki. La naturajn barojn la Ruĝa Armeo iam utiligis por frakasi la atakojn fare de la multoblaj malamikoj.

Mi vizitis la iaman postenejon Huangjanggie. Farante birdrigardon de tie mi vidis, ke malsupre montoj ĉirkaŭstaras en nebulo, kaj apenaŭ distingebla vojeto trairebla nur por unu homo zigzagas malsupren de sur la ŝultro de la alta Huangjanggie. Ĝuste tie pli ol 50 ruĝarmeanoj frakasis la atakadon fare de kvar regimentoj de la kuomintanga armeo en aŭtuno de 1928.

Nun sur Ginggang-monto jam konstruiĝis kvar ŝoseoj, sur kiuj aŭtoj povas rekte atingi la kvar najbarajn guberniojn. La ŝoseoj ŝanĝis la izolitecon de la montregiono, kaj samtempe donis favorajn kondiĉojn por grandskala konstruado de la montregiono.

TREZORPLENA MONTO EKSPLUATATA

Survoje de mia vizito mi vidis spegulsimilan lagon en montvalo apud *Tung*-arb-monto. Proksime al la lago situas hidroelektrajo evidente konstruita en la lastaj jaroj.

Belega kaj riĉa estas Ginggang-monto. En ĝia areo etendita je pli ol 250 kilometroj, ĉie troviĝas riĉfontoj. Pli ol 50 procentojn de la totala areo de la montregiono kovras arbaroj. Tie produktiĝas bonkvalita ligno de cedro kaj bambuoj taŭgaj por konstrua materialo kaj kreskas raraj kamforarboj por prepari parfuman kamfoleon. Ĝi ankaŭ disfamiĝas per produktado de teo, drogherboj, teoleo kaj *tung*-oleo (*Aleurites Fordii*); abundas en ĝi ankaŭ mineralaj riĉfontoj.

La trezorplena monto estas ekspluatata paŝon post paŝo. Nun estas konstruitaj fabrikoj de maŝinoj, papero, lignosegado ktp.

NOVA URBO EN LA MONTARO—CIPING

Transgrimpinte monton post monto, la aŭto venis al la centro de Ginggang-monto, kie mi vidis neatenditan urbon—Ciping.

Ĝi lokiĝas en malgranda baseno ĉirkaŭata de montoj. Antaŭ pli ol tridek jaroj Ciping estis la sidejo de la revoluciaj organizoj kiel la Speciala Komitato de la Hunan-Gianghi-a Limregiono de la Komunista Partio de Ĉinio, la Registaro de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj de tiu limregiono kaj la Sujĉuan-gubernia Komitato de la Ĉina Kompartio. En tiu tempo la urbon regis prospero. Tamen depost la evakuo de la Ruĝa Armeo, la reakciaj trupoj de Kuomintango plurfoje faris bruligadon kaj masakradon en la urbo, tial ĉiuj konstruaĵoj estis ruinigitaj ĝis cindroj. Nun ĝi estas rekonstruita, kaj montriĝas pli bela ol antaŭe.

Domegoj estis konstruitaj unuj post aliaj. Inter tiuj estas loĝejoj, lernejoj, kinejoj, muzeo, kulturpalaco, hoteloj, restoracioj, magazenoj, malsanulejoj ktp. Kvankam tie estas montregiono kun malfaciloj en trafiko, tamen la magazenoj estas plenaj de industriaj produktaĵoj por ĉiutaga bezonado kaj de famaj manĝaĵoj el la grandaj urboj de la tuta lando, precipe el Ŝanhajo kaj Tiangin. En la nutrajbutikoj estas provizataj eĉ la pli famaj salitaj anasoj de Nankino kaj ŝinkoj de Ginhua. Kaj ankoraŭ pli abundaj estas varoj loke produktitaj.

Post mia atingo de Ginggang-monto min mirigis tio, ke la loĝantoj tieaj venis de diversaj partoj de la lando. Post esplorado mi eksciis, ke ili alvenis por partopreni ĝian konstruadon responde al la alvoko de la registaro “Iru al vilaĝoj kaj montregionoj!”. En 1957 venis ĉi tien pli ol 700 kadroj kaj demobilizitaj armeanoj, kaj poste venis de Ŝanhajo k.a. urboj junaj intelektuloj. Post ilia alveno estis establita sindeza Ekspluatejo de Ginggang-monto. Kune kun la lokanoj ili entreprenis konstruadon de ŝoseoj, fabrikoj, hidroelektrajoj kaj ekspluatadon de virga tero.

Nun rapide iras ankaŭ la rekonstruado de la revolucia sanktejo Ginggang-monto. En la konstruado ĉiuj klopodas kun la firma decido: “Nepre konstrui la malnovan revolucion bazlokon en novan montregionon de socialismo”.

EKSTERORDINARA BATALO EN LA ORDINARA VIVO


— Pri la teatraĵo “Nepre Ne Forgesu” —

EN la nova tajdo de la socialisma kultura revolucio de Ĉinio, ankaŭ la novenaskita parola teatro kun historio de malpli ol sesdek jaroj ludas sian batalantan rolon. *Nepre Ne Forgesu* estas unu el tiaj plej populare laŭdataj teatraĵoj prezentataj antaŭ ne longe en Pekino.

La teatraĵo temas pri okazaĵo en la printempo de 1962, en ordinara loĝejo de laboristoj. Ĝi estas neta etaĝa domo, en kies teretaĝo loĝas maljuna laboristo Ding Hajkuan kun sia edzino, familio de emancipita laboristo en la nova socio. Ding Hajkuan nun estas estro de laborejo en generatora fabriko, kompartiano. En la vivmaniero ili daŭre tenas la kutimon de simpleco kaj modesteco. En la supra etaĝo loĝas Ding Ŝaŭĉun, la filo de la maljuna laboristo, kune kun siaj novedzino kaj bopatrino. Sed ĝuste en ĉi lasta same modesta etaĝo okazas serioza transformiĝo kaj sekve kaŭziĝas akra ideologia konflikto.

Ding Ŝaŭĉun estas la ĉefa persono en la teatraĵo. Li estas dudektri-jara fiksisto de elektra fadeno en la generatora fabriko, membro de la Komunista Junulara Ligo, energia, naiva, kaj antaŭiranta laboristo en la fabriko. Li kvankam plenkreskiĝis en la laborista familio, tamen ne travivis penigan batalon kaj hardadon. Lia novedzino Jaŭ Jugjuan estas flegistino de la fabrika saniga stacio. Ŝi estas afabla, ĝentila kaj ŝajne iom sin ornamema, kaj havas malklaran inklinon al progreso.

S-ino Ding donas ne tute bruligitajn karbobulojn kolektitajn de ŝi al s-ino Jaŭ por plua uzo, sed tiu ĉi ŝin mokas pri troŝparemo.



La kunloĝanta bopatrino estas iom gradika maljunulino. En la pasinteco ŝi estis posedanto de butikoj kaj tre lertas en kalkulado kaj profitĉaso. Kvankam nun ŝi vivas kune kun siaj filino kaj bofilo, sed ŝia profitĉasemo restas senŝanĝa, kaj ŝi ĉiam pensas ke ili devas ĉasi kromenspezojn kaj vivi pli bone ol la aliaj. Ŝi kaŝe vendis parton de la sovaĝanasoj ĉasakiritaj de la bofilo dum la ferioj por akiri monon. Ŝi sekrete entreprenas kontraŭleĝajn spekulaciojn kia kolportado de naftalin-buloj ktp. por ke ili vivu pli bone ol la aliaj.

Ŝi tre “amas” sian bofilon, tial ŝi sincere deziras ke li ĝuu pli bonan vivon, kaj ke li ofte havu enspezojn ekster la salajro. Ŝi fervore instigas lin ĉasi pli da sovaĝanasoj por ŝia sekreta spekulaciado kaj tiamaniere enspezi certan sumon da mono kiel ilian kromenspezon. Rilate al lia okupo en la fabriko, ŝi opinias, ke ĝi estas nur vivrimedo. Ĉu labori bone aŭ malbone, ĉu kaŭzi perdon aŭ ne al la intereso de la ŝtato, ĉio ĉi estas ekster ŝia zorgo.

Iun tagon, kiam la edzino de Ding Ŝaŭĉun revenis hejmen kunportante kompletan daŭlan vestojn, tiu ĉi ilin prove surmetis al si kaj trovis ke ili bone sidas kaj aspektas bele. La “amema” bopatrino tuj kaptis la novan celindan objekton.

Energie ŝi instigis Jaŭ Jugjuan aĉeti por sia edzo tiajn lanajn vestojn kostantajn je 148 juanoj.

La sindikata laboranto urĝigas ilin redoni la depruntitan monon.





Ding Ŝaŭĉun konsterniĝas ne povante trovi sian ŝlosilon.

Sed de kie ili akiru la bezonatan sumon da mono? La maljuna sinjorino elpoŝigis cent juanojn. Ŝi detale diris al sia filino la devenojn de la cent juanoj por pruvi la pravecon de sia filozofio kaj la lertecon de sia manovro en spekulacio. Fakte, la plejparto de tiu ĉi monsumo konsistas el enspezo pro la forvendo de la sovaĝanasoj, kion ŝi faris post la dorsoj de siaj filino kaj bofilo, kaj la cetera parto estas kontraŭleĝa profito en la sekreta kolportado de naftalin-buloj kaj pagoj kiujn ŝi kaŝe postulis de la helpopetantoj kiujn Ding Ŝaŭĉun helpis ripari blovilojn.

Tamen la sumo ankoraŭ ne sufiĉos. Pro tio ŝi sekrete pruntis de la sindikata kasisto 50 juanojn el la interhelpa fonduso. Sekve kompleto da lanaj vestoj kun prezo de 148 juanoj finfine venis en ŝiajn manojn.

Sed kiel redoni la pruntitan monon? Laŭ la profitĉasa filozofio de sinjorino Jaŭ, tion oni facile solvos per kelke da pliaj ĉasadoj de sovaĝanasoj. La filino ankoraŭ hezitas timante ke la edzo ne konsentos repagi la ŝuldon tiamaniere. Sed sinjorino Jaŭ firme persistas je sia opinio dirante: "Trankviliĝu! Mi kuraĝas eĉ garanti ke portante bonkvalitajn vestojn li ĉasos des pli fervore. Ĉu oni ne tiel diras: 'Kutimas ĝui frandojn, domaĝas ne la plandojn.'"

Kaj vere tiel okazas, ke Ding Ŝaŭĉun, eminenta produktanto en la fabriko, jam ne povas liberiĝi de ŝia kateno post kiam li sin volvis per la kompleto da altkvalitaj vestoj. Je la komenco, kiam li aŭdas ke por pagi la ŝuldon estas necese ĉasi sovaĝanasojn, li ankoraŭ sentas ke tio estas ne konvena por laboristo kaj membro de Komunista Junulara Ligo. Tamen post la alloga persvado de la bopatrino, kaj trovante neniun alian elirejon li do volonte klopodas plue ĉasadi por pagi la ŝuldon.

Tial tiu ĉi eminenta laboristo ofte deturnas sian atenton de la produkta laborado. Iufoje, sabaton, pro zorgado pri aĉeto de vagonara bileto por la dimanĉa ĉasado, li forgesis ŝalti la elektran fornon por varmigi la bobenojn kaj pro tio kaŭzis malŝparon de labortempo. Sed el tio li ne vidas, ke li devas esti atentema.

En posttagmezo de alia sabato, dum en la fabriko ĉiuj estas streĉe okupataj de laboroj, Ding Ŝaŭĉun tamen okupiĝas pri sia projekto forveturi ĝustatempe per la vespera vagonaro por la planita ĉasado. Li haste rapidas hejmen por vespermanĝi kaj preni la ĉasfusilon kaj la ĉasvestojn kaj denove haste revenas en la fabrikon por fini sian laboron. Pro nezorgemo li faligis sian kupran ŝlosilon en la muntatan generatoron. Tio signifas enmeti prokrastan bombon en la generatoron.

Sed li jam ne havas tempon por pripensi kiel trovi la ŝlosilon kaj sekurigi la maŝinon, ĉar lia penso jam flugis al la tuj veturonta vagonaro, al la ĉasado.

Li estis tro pasia en la ĉasado, ke li maltrafis la trajnon por reveni ĝustatempe, kaj li devis atendi. Li sukcesis reveturi en la urbon nur lunde, tro laca kaj peze ŝarĝita de "gajnaĵoj". Li forestis sen forpermeso dum tre streĉa labortempo.

Kaj kion fari pri la ŝlosilo perdita en la generatoro? Ding Ŝaŭĉun tre maltrankvilas pro ĝi. Sed lia bopatrino foj-refoje konsilas, ke li nepre ne konfesu la aferon al la fabriko. Ŝi argumentas, ke tion oni neniam rimarkos kaj eĉ se la generatoro difektiĝos, tio estos ne granda perdo. Fine ŝi eĉ ruze trompis lin per alia ŝlosilo por ke li lasu la ideon de kontrolo pri la generatoro kaj kaŝu la eraron.

La fakton, ke la juna antaŭiranta laboristo estas tiamaniere iom post iom koruptita de la burĝa ideologio kaj degeneras paŝopostpaŝe, finfine rimarkas la maljuna laboristo Ding Hajkuan. Li pentas ke antaŭe tro simplan koncepton li formis al si pri la junuloj elkreskintaj en la nova socio, ke ili estas nature imunaj de influoj de la malnova socio. Kiu atendas ke kiam la infanoj estas portantaj la ruĝan koltukon de junpioniro, iuj jam ofte klopodas ŝtele volvi sur iliajn kolojn "nigran koltukon". Serioza klasbatalo iras sen pafado, sen kanonado, dum harmonia babilado. Tio estas klasbatalo ne facile rimarkebla sed facile forgesebla.

Rimarkinte la burĝonantan eraran tendencon de sia filo Ding Hajkuan tuj batalas kontraŭ ĝi. Li ĝustatempe sonigis alarmon al sia filo kaj konsilis ke li ne forgesu ke li estas membro de la laborista klaso, ne forgesu sian devon por la socialisma konstruado kaj komprenu ke la alta idealo de la laborista klaso nepre ne celas frandi kaj pavi en lanaj vestoj en la estanteco. Finfine li malkaŝis la fikonduton de sinjorino Jaŭ en falsigo de la ŝlosilo kaj sekurigis la generatoron kaj elsavis la junan laboriston. Dank' al la helpo de la patro kaj kolegoj la junulo kaj lia edzino finfine konsciigis pri sia eraro. Kun honto kaj doloro li diris al siaj karuloj: "Ho, kiel terure!... Oni neniam povos min pardoni pro tio!"



III. PRAKTIKA VEJĈI-LUDO

I. Strategiaj Principoj

Por praktiki vejĉi-ludon ne estas sufiĉe koni nur taktikojn, kiuj gvidas la batalon en iu parto, sed ankaŭ la strategiajn principojn, kiuj decidas la venkon aŭ malvenkon de la tuta ludo. Sube estas la fundamentaj el ili kaj validaj por ĉiuj stadioj de la ludo.

1) Multigi la liberajn punktojn en sia flanko kaj minimumigi ilin en la kontraŭa flanko.

Venko de la ludo estas taksata laŭ la nombro de la okupitaj punktoj. Ĉar la du flankoj per alterna ŝton-meto ja metas preskaŭ saman nombron da ŝtonoj sur la vejĉi-tabulo, tial se en iu flanko troviĝas pli da liberaj punktoj, tio signifas, ke tiu ĉi flanko superas la kontraŭan.

Ofte estas du mankoj ĉe la komencantoj de la ludo por praktiki tiujn ĉi principojn, nome:

a. Ĉiam zorgi pri la sekureco de siaj ŝtonoj kaj klopodi unue fari la necesajn okulojn. Sekve ili minimumigas la liberajn punktojn de sia flanko kaj perdas la tempon rezisti invadon de la kontraŭa flanko;


b. Absorbiĝi nur pri persekutado de kontraŭaj ŝtonoj kaj neglekti siajn malfortojn.

Tion oni devas eviti.

2) Okupi plej grandan teritorion per plej malmulte da ŝtonoj

— Ni povas esplori tiun eblon laŭ jenaj du vojoj:


Diag. 43



a. Laŭ loko sur la vejĉi-tabulo: Ni vidu la Diag. 43. En tiu ĉi Diag., ĉiu el la tri grupoj okupas 12 liberajn punktojn. Sed por tiu en la mezo 14 ŝtonoj estas bezonataj, por tiu ĉe la limo — 10 ŝtonoj, sed por grupo ĉe la angulo sufiĉas nur 7 ŝtonoj. Ĉar en la mezo la grupo devas sin defendi ĉe kvar flankoj, sed ĉe la limo nur tri flankoj bezonas defendon, kaj ĉe la angulo — nur du.

Oni povas konkludi el tio, ke la angulo estas la plej ideala loko por efektivi tiun postulon.

Diag. 44




b. Laŭ maniero: Ni vidu la Diag. 44. En tiu ĉi Diag. la 19 nigraj ŝtonoj estas vicigitaj unu tuj apud alia, kaj ili sume okupis 38 liberajn punktojn; dume la 9 blankaj ŝtonoj ĉe la dekstra flanko okupis tute saman nombron da liberaj punktoj. Tial oni devas bone utiligi la ŝtonojn, ke ili disvolvu sian potencon kaj uzi ilin nur kiam ili estas bezonataj.

3) Ne perdi la iniciativon

— Iniciativo estas grava faktoro por la venko de vejĉi-ludo. Iu flanko povas elekti la plej favoran punkton por sia ŝton-meto, nur kiam ĝi ĝuas la iniciativon. Alie ĝi enfalas en situacion defensivan, kiu devas esti evitata por lertaj vejĉiistoj.

Por praktiki ĉiujn tiujn principojn oni devas konsideri la tutan situacion sur la vejĉi-tabulo, sed ne limigi sian atenton nur al iu parto de la ludo.



La konkurso iras en la Laborista Gimnastika Halo de Pekino, kiu povas enteni 15,000 rigardantojn.

ĜANG GIAN:

LA PEKINA INTERNACIA TABLOTENISA INVITA TURNIRO



*La rigardantaro bolas per
aplaŭdoj kaj ĝojkrioj.*

DE la 18-a ĝis la 21-a de oktobro, 1964, okazis en Pekino la Internacia Tablotenis Invita Turniro, en kiu partoprenis 8 landoj de Azio, nome, Kamboĝo, Cejlono, Indonezio, Japanio, la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, Nepalo, la Vjetnama Popola Respubliko kaj Ĉinio, kaj sume 66 elstaraj tablotenisaj gesportistoj.

Dum la Turniro okazis pli ol 110 maĉoj. Ĝi alportis la jenan rezultaton: Ĉinio gajnis la ĉampionecon en la konkursoj de la vira unuopa konkurso kaj la duopa konkurso kaj Japanio la ĉampionecon de la virinaj unuopa, duopa kaj gevira duopa konkursoj.

Solidareco, demokratio, interhelpemo, egaleco, reciproka lernado por kuna progresado plene sin manifestis en la Turniro. Tiu ĉi turniro plifortigis la unuecon kaj amikecon inter la sportistoj el la partoprenintaj landoj kaj la popolo de la Nove Emerĝintaj Fortoj kaj faris novan kontribuon por akceli la disvolviĝon de la tablotenis sporto en Azio kaj en la mondo.

La konkursadon regis nova moro de solidareco, amikeco kaj interŝanĝo de spertoj. Multaj eminentaj sportistoj fervore klarigis sian arton al la novaj kolegoj kaj humile lernis de la diverslandaj sportistoj ĉion lernindan. Oni vidis ofte ke sportistoj el malsamaj landoj tiel serioze kunludas por ekzercado antaŭ la konkurso kaj tiel fervore interparolas pri siaj spertoj post la konkurso, tiel ke ili plibonigis la interkomprenon kaj plifortigis la amikecon inter si. Ĝuste kiel K. Hasegaŭa, estro de la japana teamo diris: Nia ĉefa celo estas intimigi la amikan rilaton inter diversaj landoj pere de la konkurso kaj nia plej granda rikolto estas en tio. Ankaŭ Nguyen Dac Tho, ĉefo de la vjetnama teamo diris: Dum la kelktaga konkursado, ni spertis venkojn kaj malvenkojn. Sed tio ne gravas,

ĉar ni emfazas la spiriton de amikeco kaj solidareco. Kaj tiu spirito ĉion superas. Ĝang Gjunhan, ĉefo de la ĉina teamo diris: El la Turniro, ni ĉinaj sportistoj lernis multajn valoraĵojn de la diverslandaj geamikoj. Li esprimis ke la ĉinaj tablotenisistoj devas pliapaŝe disvolvi sian rilaton kun la sportistoj de diversaj landoj por intimigi amikecon kaj kune sin perfektigi en la sporto.

Kvankam tiu ĉi estas nur invita turniro en la limo de Azio, tamen ĝin partoprenis multe da mondfamaj sportistoj, kaj ĝi estas turniro kun alta monda nivelo de tablotenis. Ilia ludarto ricevis multajn laŭdojn de tablotenisistoj. La estro de la kamboĝa teamo Nai Haur montris: Altnivela estas la Turniro, diverslandaj sportistoj tre bone ludis en la konkurso, kaj tre justaj estis la juĝantoj. S. Hardjolukito, estro de la indonezia teamo diris: Montriĝis el la Turniro ke tre rapide disvolviĝas la tablotenis ludarto de la popolo de la Nove Emerĝintaj Fortoj. Precipe ĝojinda estas tio ke aperis multe da novaj sportistoj kiujn atendas brilaj sukcesoj en ilia arto. La fama trejnisto el Japanio I. Ogimura diris: La ludonivelo de la Turniro, sendube, estas la plej alta en la mondo nuntempa.

Ĉe la fino de la Turniro, la sportistoj kuraĝigis unu alian atingi novan nivelon en la 28-a Monda Turniro por Tablotenis Ĉampionecon, kaj kontribui pli multe al la plialtigo de la monda nivelo de tablotenis kaj al la plifirmigo de la amikeco inter ĉiulandaj sportistoj.

Por atingi la diritan celon, la diverslandaj reprezentantaj teamoj unuanime decidis, ke tia invita turniro estu okazigata unu fojon en ĉiu jaro, kaj fondiĝis la Pekina Interliga Komitato de la Internacia Tablotenis Invita Turniro en Azio.

Tiel komenciĝis nova historia periodo por la sporto de tablotenis en Azio.




Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Vicĉefministro He Long intime parolas kun la diverslandaj tablotenisaj teamestroj, trejnistoj kaj sportistoj kiuj partoprenas en la Pekina Internacia Tablotenis Invita Turniro.



Sportistinoj S. Lucas el Cejlono (maldekstre) kaj Ĝeng Mingi de Ĉinio interparolas pri la ludarto de tabloteniso.





Ĉinaj tablotenisistoj Ĝuang Zedong (la unua de dekstre), Liang Liĝen (la unua de maldekstre) kun S. Utomo (la dua de dekstre) kaj A.L. Maladi (la dua de maldekstre) el Indonezio intime babilas antaŭ la konkurso.




Tablotenisistinoj Yoon Kang Ja el Koreio (maldekstre), Ĝeng Mingi de Ĉinio (meze) kaj Ngyen Thi Mai el Vjetnamio.

Ĝuang Zedong (dekstre) de Ĉinio kaj K. Konaka el Japanio ĉe la mangotablo.

Tablotenisistoj Khau Bou (dekstre), Lim Teck Khun (maldekstre) el Kamboĝo kaj Y.P. Lohani (meze) el Nepalo interŝanĝas donacojn dum vizito al la Somera Palaco.



Por Lerno de Riĉrikolta Sperto



*Sen tamtamad' sen tamburanto,
Honora gasto ĉe l' kamprando,
Lanternojn svingas la sorgplantoj,
Maizoj ridas dentmontrante.
Spertlerni la guberniestro venis,
Sed li unue ŝpaton prenis.*

Ke Floroj Belu sen Pluvfalo

*Neriĉaj, sed kun ambicio,
Batalas kontraŭ l' Drako-dio*,
Kaj hakas montojn por kanalo,
Ke floroj belu eĉ sen pluv-falo.*

*En ĉina mitologio, drako estas reganto de akvoj kaj pluvado.

Eterna Kiaj Mont' kaj Maro

*La fiŝoj ŝatas naĝi supren en rivero,
La birdoj ŝatas flugi alte en aero,
La membroj amas la komunumon en prospero
Eternan kiaj mont' kaj maro de la tero.*

Jen Klara Akvo Kuras



*Ŝovelon post ŝovelo
Ŝutiĝas supren tero,
Formiĝas digo el la
Korbŝarĝoj ĉe l' rivero.
De l' tondraj labor-krioj
Tremadas la aero,
Kanalo elkreiĝas
El perloj de ŝvitero.
Jen klara akvo kuras
Pretere antaŭ l' pordo,
Anseroj, karpoj ludas
Plezure en konkordo.
Avinjo per la manoj
Ekprenas flu-kristalon,
Aŭdiĝas rid-aklamo
De ŝi trans la kanalon.*

TRAD. LAŬLUM

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

SES NOVAJ REKORDOJ EN NAĜADO DE GEJUNULOJ

Ĝis la fino de septembro, pasintjare, la junaj sportistoj de Ŝanhajo rompis ses landajn rekordojn en naĝado.

3 el tiuj rekordoj estas de la konkurso de stafeta naĝado. La antaŭaj junulaj rekordoj de la lando en virina 400-metra liberstila stafeta naĝado, virina 400-metra stafeta miksitita naĝado, vira 400-metra stafeta miksitita naĝado, estis respektive 5' 3'' 4, 5' 33'' 8, 4' 42'' 1 kaj post la renovigitaj estis 5' 2'' 9, 5' 27'' 5 kaj 4' 37'' 8.

La tri aliaj novaj rekordoj estas: virina 800-metra liberstila naĝado — 11' 59'' 4, vira 200-metra surdorsa naĝado — 2' 34'', kaj virina 400-metra individua miksitita naĝado — 6' 29'' 9.

ŜANHAJA OPERO "LA FAJRE-ROJ EN FRAGMENTEJOJ" VARME AKCEPTATA

La revolucia teatraĵo "La Fajreroj en Fragmentejoj" ludita de la Ŝanhaja Popola Opera Trupo ĝuas varmegan akcepton ĉe la vasta amaso de rigardantoj. Ekde ĝia sursceniĝo en 1960 ĝis septembro en 1964, la teatraĵo estas jam 500-foje ludita. Preskaŭ ĉiufoje plenas la teatro kie ĝi estis ludata. Multe da spektantoj eĉ diskutis ĝin en kunveno aŭ skribis leterojn al la Trupo kaj geaktoroj pri siaj impresoj kaj la ricevita kuraĝigo de la teatraĵo kiun ili rigardis kaj esprimis siajn laŭdojn pri ilia sukceso.

Laŭ statistiko, estas pli ol 30 trupoj de lokaj teatraĵoj tra la lando kiuj jam prezentis aŭ pretas sursceniĝi la teatraĵon.

AŬTOMATA POŝTEJO

La unua aŭtomata poŝtejo en Pekino malfermiĝis al la klientaro en oktobro lastjare. Poŝtaj laboroj en tiu ĉi oficejo kiujn antaŭe oni devis fari per manoj, estas nun plenumataj per pli ol dudek aŭtomataj aparatoj. La unua tia poŝtejo de Ĉinio estis fondita en 1960. Dum ĝia 4-jara funkciado oni akumulis sperton por plibonigi la ekipaĵojn kaj pliapaŝa disvolvo de tia arango.

Vortoj signitaj per "*" estas klarigitaj en
"Nia Vortareto"

LETERO AL MALPROKSIMAJ AMIKOJ (V)

NOFHAN

PRIVATA PROPRAĴO EN ĈINIO

Karaj geamikoj,

Vi demandis, ĉu en Ĉinio troviĝas ankoraŭ privataj proprajoj.

Evidente Vi mis-opinias, ke en socialisma socio ĉio estas komuna proprajoj kaj neniu persono havas ion sian propran.

Fakte, ne.

Jes, la privata posedant-eco de la produktaj rimedoj estas plene nuligita en nia lando kaj ĉiuj fabrikoj, uzinoj kaj ĉefaj produktiloj fariĝis komuna posedaĵo de la popolo aŭ de iu kolektivo kiel ekzemple la diversaj kooperativoj kaj popol-komunumoj. Sed la materialoj bezonataj por la ĉiutaga vivado posedataj de iu persono aŭ familio restas proprajoj privata, kaj tiu privata proprajoj estas same protektata* de la leĝo.

Jam en la Fundamenta Leĝaro de la Ĉina Popola Respubliko estas difnita, ke "La ŝtato protektas la posedantecon de laŭleĝaj enspezoj, ŝpar-mono, loĝejo kaj diversaj materialoj por ĉiutaga vivado de la popolanoj" kaj ke "La ŝtato laŭleĝe protektas hered-rajton de privataj posedaĵoj de la popolanoj".

Ĉinaj popolanoj havas, laŭ siaj laboroj, diversajn enspezojn: La laboristoj kaj funkciuloj en diversaj instancoj havas sian salajron, la

popol-komunumanoj—la dividajojn laŭ siaj laboroj, kaj en iliaj familioj foje ankaŭ en-spezojn de diversaj flankaj produkt-adoj. Ĉiuj tiuj enspezoj estas privataj proprajoj de la popolanoj, kaj estas protektataj de la ŝtato.

Ankaŭ la labor-enspezoj de la man-laboraj kooperativ-anoj, la interezo* fiksita de la ŝtato laŭ la kapitalo kaj pagata al la antaŭaj kapitalistoj estas klasifikitaj al proprajoj privataj.

Cetere, ŝpar-mono en la banko kaj interezo de la ŝpar-mono, loĝejo, meblaro, vestoj, biciklo, aŭto, radi-ricevilo, televida* aparato kaj ĉiuj tiaj materialoj por ĉiu-taga vivado posedataj kaj uzataj de la popolanoj estas privataj proprajoj. Kompreneble por materialoj komune uzablaj, kiel ekz-e loĝejo, meblaro k.t.p. oni rajtas ĝui ilin ankaŭ de la kolektivo, se oni ne havas sian propran.

Al sia privata proprajoj ĉiu havas rajton libere disponi. Li povas ĝin donaci aŭ heredigi al iu, li povas ĝin aĉeti, kiam li ĝin bezonas, aŭ for-vendi, kiam ĝi fariĝis superflua por li.

Unu-vorte, en Ĉinio nun neniu povas preni ĉefajn produktajn rimedojn kiel siajn proprajojn por ekspluatadi aliajn homojn, sed pri konsumajoj por la ĉiutaga vivado, ĉiu havas siajn proprajn.

Mi esperas, ke mia klarigo sufiĉas por komprenigi al Vi la aferon kaj refuti kalumniojn de la malamikoj de la nova Ĉinio.

Rakontoj pri Afanti

KOSTO DE REĜO

Iutage, Afanti sin banis kun la reĝo kaj tiu ĉi lin demandis:

"Kiom mi kostus, Afanti, se oni vendus min kiel sklavon?"

"Apenaŭ dek mon-erojn." respondis Afanti.

"Ho, sensencaĵo!" ege koleris la reĝo. "La brodita* tuko sola, kiun mi portas, jam kostas dek mon-erojn."

"Jes, via saĝa reĝa moŝto!" asertis Afanti montrante la tukon, "Ja nur tio kostas dek mon-erojn."

"KE ĜI NE SOIFU*!"

Foje Afanti ĉeestis ge-edz-iĝan festenon*. Li trovis tie gaston, kiu ne nur manĝegis sed ankaŭ en-metis bon-gust-ajojn en sian poŝon. Tiam Afanti prenis teujon kaj verŝis teon en lian poŝon.

"Ho, kial vi verŝis teon en mian poŝon?" mire demandis la gasto al Afanti.

"Nu, por ke ĝi ne soifu. Ĝi ja manĝis tiom multe da bon-gustajoj," sprite respondis Afanti.



OR-RINGO

Iu amiko adiaŭis al Afanti antaŭ sia vojaĝo por komercado. Subite li vidis brilantan or-ringon sur fingro de Afanti, kaj trege deziris ĝin havigi al si.

"Mia kara Afanti," la amiko diris, "ni estas malnovaj amikoj. Estos ĉagrene por mi ne vidi vin dum longa tempo. Ĉifoje mi foriros por komercado, kaj mi ne scias, kiam mi povos reveni. Estus bone ke vi donacu al mi la or-ringon. Kiam mi vidos ĝin, mi do kvazaŭ vidos vin."

"Dankon pro via bonvolo, mia amiko!" respondis Afanti. "Estos same ankaŭ por mi longtempe ne vidi vin. Do lasu la or-ringon resti ĉe mi! Kiam mi ĝin vidos, mi ekmemoros, ke vi iam petis ĝin, kaj tiam mi kvazaŭ vidos vin."

Nia Vortareto

Brodi—Fari ornamojn sur teksaĵo per kudr-eroj.

Festeno—Luksa kun-manĝo de multaj gastoj.

Interezo—Krom-pago laŭ procento de la ŝuldo.

Protekti—Defendi iun pri io.

Soifi—Senti bezonon trinki.

Televido—Vidaĵo sendita per elektraĵ ondoj.

T. Nakamura (plumnomo: Teruo Mikami): **ENCIKLOPEDIETO JAPANĀ** — eldonita de KOSMO, 1 Imai-cho, Kitaku, Osaka, Japanio. La libro enhavas 400 kapvortojn, inkluzive de 150 botanikaj kaj zoologiaj nomoj kaj havas 200 paĝojn (15 x 21.5 cm.) kun 80 belaj fotoj, presitaj sur glacea papero, tolbindita kaj vestita per kovrilo desegnita kaj kun kartona ŝirm-skatolo. Prezo \$ 5.00 plus sendkosto 10%. Mendebila ankaŭ ĉe UEA.

La enciklopedieto prezentas al la legantoj la japanan tradicion pensmanieron, kutimon, kulturon kaj arton. La aŭtoro donis ne nur detalan klarigon pri ĉiu vorto, sed ankaŭ historian evoluon kun multaj ilustraj fotoj kaj ekzemploj. Ĉiu turisto aŭ fremdulo, havante en siaj manoj la libron, povos pli facile kaj pli bone scii la socivivon de la japana popolo. Se oni volas studi la japanan vivmanieron aŭ kulturon, tiu ĉi libro ankaŭ multe utilas.

Evidente por konigi japanajn aferojn kaj japanajn esprimojn eĉ japanajn parolojn al la monda esperantistaro, tiu ĉi libro rikoltos certe grandan sukceson. Sed rilate la proponitajn por Esperanto neologismojn bazitajn sur la japana lingvo mi timas, ke la esperantistoj, eĉ tiuj el la orientaj landoj, ekhavas multajn skrupulojn por la evoluo de Esperanto. Tio estas tre komplika problemo kaj ne estas facile solvebla. La aŭtoro jam menciis en la antaŭparolo unu flankon de tiu ĉi problemo pri nomoj de komunaj objektoj en pluraj aziaj landoj. Laŭ mi nomoj de tiaj objektoj povas esti dividitaj en jenajn du kategoriojn:

- 1) La komuna objekto havas analogian elparolon.
- | | | |
|-----------------|-----------------|------------------|
| | (Por | (Por |
| | sojfab-kazeo) | “abako”(2)) |
| Enciklopedieto | Toŭfuo | Sorobano |
| Ĉina lingvo | Toŭfu | Suanpan |
| japana lingvo | Tofu | Soroban |
| Korea lingvo | Dubu | Supal |
| Vietnama lingvo | Đậu phụ (Doŭfu) | Bàn gậy (Bangaj) |

- 2) La komuna objekto havas diferencon elparolon.
- | | |
|-----------------|----------------------|
| | (Por manĝbastonetoj) |
| Enciklopedieto | Haŝio |
| Ĉina lingvo | Kuajcz |
| Japana lingvo | Haŝi |
| Korea lingvo | Cesgajal |
| Vietnama lingvo | Đũa |
| Angla lingvo | Chopsticks |
| Franca lingvo | Baguettes |
| Germana lingvo | Eßstäbchen |

Por la unua kategorio ŝajne oni devus trovi pli korektan esperantan formon laŭ la fonetikaj reguloj de la koncernaj lingvoj. Pri la dua kategorio, se la objekto povas esti esprimita per la ekzistanta vortmaterialo, kiel ekzemple, “manĝbastonetoj”, preferinde ni ne enkonduku superfluan formon havantan nenian internaciecon eĉ por orientaj landoj kiel “haŝio”.

Kelkaj aliaj objektoj pri budhismo havas pli vastan komunecon. Preskaŭ en ĉiuj naciaj lingvoj ili alprenas malsamajn formojn. Tamen plejparto el ili devenas de la sanskrita lingvo. En tiu ĉi kazo, estus

pli simple kaj pli logike enkonduki sanskritan formon en Esperanton.

Pri nomoj botanikaj kaj biologiaj, se ili troviĝas ne nur en Japanio, verŝajne oni devas difini la nomojn en Esperanto laŭ metodoj supremenciitaj.

La libro profunde impresis min ke la japana popolo tre amas sian tradicion, sian naturan belecon kaj precipe sian patrion. Ja ĝuste pro tio la japana popolo nun batalas por sendependeco, demokratio, paco kaj neŭtraleco, por forskui la jugon aldonitan de Usono.

STEMU

SALUTPAROLADOJ KAJ FESTPAROLADO de la 49-a U. K. — Jen du diskoj eldonitaj de UEA. En la unua, troviĝas fragmentoj de la salutparoladoj de esperantistoj el 29 landoj, kaj en la dua, la plena parolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna. Ni ne parolu pri la enhavo. Ĉar pri “kunlaboro” kaj “paco” oni havas malsamajn difinojn laŭ siaj sociaj pozicioj. Al imperiistoj kaj koloniistoj la “kunlaboro” kaj “paco” signifas senrezistan ekspluatatecon kaj sklavecon de la subpremataj popoloj. Komprenoble tiajn “kunlaboron” kaj “pacon” ne postulas la subpremataj kaj ekspluatataj. Abstrakta termino tiuflanke alportas nenion.

Tamen la du diskoj prezentas gravajn dokumentojn. Ili elokvente pravas, ke kiomgrade Esperanto povas servi al komunikado de pensoj inter malsamaj popoloj. La salutparoladoj de diverslandanoj havas kvankam iom naciajn kolorojn de la parolintoj, tamen ili ĉiuj estas klaraj por la aŭskultantoj. La festparolado donis krome pruvon de flueco kaj elokventeco. De ili E-lernantoj povas ĉerpi parol-modelojn kaj E-grupoj, bonajn propagandajn materialojn.

Prezoj: 1.50 gld. aŭ 6 steloj por SALUTPAROLADOJ, kaj 3.00 gld. aŭ 12 steloj por la FESTPAROLADO.

LA DUA A. P. -LIBROLISTO — A. P. verŝajne estas profesia librovendejo, kiu prizorgas disvendon ankaŭ de esp-aj libroj, kaj eldonis eĉ la duan libroliston. Ĝojinda afero por ĉiuj esperantistoj. En la listo troviĝas ne nur titoloj kaj prezoj, sed ankaŭ koncizaj klarigoj de la enhavoj. La legantoj povas per ĝi bone sin orienti en la elektado de taŭgaj libroj. Tiu ĉi listo kolektis sume 208 titolojn. Komprenoble ne kompleta. Tamen oni trovas en ĝi la pli-malpli gravajn en la nuna esp-eldonado. Estas dezirinde, ke ĝi fariĝu pli kompleta kaj regula periodaĵo de esp-aj libroj, kaj ke la A. P. -librejo fariĝu centro, kiu liveras ĉiujn akireblajn esperantaĵojn.

NEDERLANDO — La unua kolorbilda fot-poŝlibro en serio “La Mondo en Koloroj” eldonata de Bruna, Utrecht, unu el la plej grandaj eldonejoj de poŝlibroj en Nederlando. 64 kolorbildoj kaj 17 nigra-blankaj donas impreson pri la lando. La teksto informas pri la historio, urboj, homoj, turismaj eblecoj de Nederlando. Formato 175 x 112 mm. kun glazurita kovrilo, 104 paĝoj. Prezo: 3.50 gld. aŭ 14 steloj. Mendebila ĉe UEA.

RICEVITAJ LIBROJ (el la duope venintaj ni recenzos poste)

HAMLETO — traduko de D-ro Zamenhof reeldonita de Editions Françaises

D' Esperanto. Prezo: 14 frankoj (por ordinar-papera), 17 frankoj (por luks-papera).

H. C. Andersen: **LA NOVAJ VESTOJ DE LA IMPERIESTRO** kaj du aliaj fabloj — trad. de Ib. Schleicher, eld. de Eldonejo Koko, 1964.



DU EKSTERLANDAJ ESP-ISTOJ VIZITIS PEKINON

En oktobro, 1964, la tuta ĉina popolo ĝojplene festis la 15-an nacian feston, kaj okaze tiam nin honoris du eksterlandaj esp-istaj amikoj. Unu el ili estas Kho Kwat Liat el Indonezio, kiu trapasis nian ĉefurbon Pekino reirante al sia patrolando de Anglio. La alia estas franca s-anino M. Bonafous kiu venis al Cinio por kulturaj laboroj. Ili ricevis bonvenigon de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ĝiaj membroj. Kaj ili esprimis grandan ĝojon pri la sukcesoj de la ĉina popolo en la pasintaj 15 jaroj.

LA 50-A U. K.

La 50-a U. K. okazos en Tokio de Japanio. Tio estas la unua fojo, ke orientazia urbo estas elektita kiel la kongresurbo de U. K. La japanaj esp-istoj estas farantaj ĉian necesan preparon, kaj atendas grandan nombron da partoprenantoj. Laŭ statistiko ĝis 10. IX. 1964 jam 417 esp-istoj el 38 landoj sin anoncis al la kongreso.

LA 34-A KONGRESO DE BLINDAJ ESP-ISTOJ

Lastjare okazis en Hago la 34-a Kongreso de Blindaj Esp-istoj. Partoprenis 160 kongresanoj el 16 landoj. El ili 90 estas viroj kaj 70 virinoj.

E-MEMOR-ŜTONO POR ĈEĤOSLOVAKA INSTRUISTO

Je 21. VI. 1964 en Pribor-ĈSSR estis inaŭgurita esperanta memorŝtono en ĉefa jubilea urba parko. Ĝi estis dediĉita al ĉeĥoslovaka instruisto Th. Ĉjka, kiu estis multmerita en esperanta movado antaŭ 60 jaroj inter ĉeĥoj kaj slovakoj dum aŭstria epoko. Li ankaŭ iniciatis pedagogian revuon esperantan dediĉitan al internacia instruistaro, krom eldonadon de esp. lernolibroj kaj aliaj esperantaĵoj. La inaŭguron partoprenis multaj geesperantistoj el la ĉirkaŭaĵo.

(Laŭ A. Satek)

LA UNUA ESP-FILMO

La unua esp-filmo estis prezentita en la 49-a U. K. Verŝajne tre ĝojiga novaĵo por la esperantistoj. Sed tre bedaŭrinde la filmo enhavas nenion alian ol murdoj, ŝteladoj k. s. montrantaj moralan kolapson de la kapitalisma socio. Do, ne estas mirinde, ke ĝi renkontis apation de la spektatoroj, kvankam multaj eminentaj esp-istoj eternigis sian voĉon sur la filmstrioj.



Jen nova rubriko inter ni kaj por ni—la vasta legantaro kaj nia redakcio. En ĝi ni aperigas temojn komune interesantajn.

Korespondi Deziras

*Kuzlaeva Lusja, g. Rostov-na-Donu-33, ul. Magnitogorskaja 60, USSR.

*20 infanoj 10-14 jaraĝaj dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj: Geknaba Esperanto-Klubo de SVETLANA GAREVA, s-ro Marŝaŭkovski, poŝtfako 254, Gdansk 1, Pollando.

*Jenaj s-anoj dez. kor. kun amiko el Azio:

Geo Marger (19 jara), "Gorazd" 68, Vidin, Bulgario.

Radoslav Slavov (19 jara), H. Ivanov-17A, Varna, Bulgario.

Georgi Zehirov (20 jara), PLEVENSKA, s. Tranĉovica, Bulgario.

Genĉo Genĉev (20 jara), "Vazrajdane"-31, (Targoviŝtko), Popovo, Bulgario.

*Ĉilola Vigneri, Viale Della, Naguolie N-ro 14, Palermo, Italio. dez. kor. pri vivproblemoj, vivmaniero, ktp.

*S-ro D. P. Faux, Bulstrode, Gerrards Cross, (Bucks), Anglio.

*Ing. Jozefo Fischhof, Košice, ul. Narod, povstania 24, ĈSSR, dez. kor. pri temoj ĝardenistaj.

*20 diversaĝaj gekursanoj-komencantoj kaj 25 gelernantoj 12-13-j. dez. kor. pri ĉt kun ĉl. Skribu al: Farkas Mihaly, tanar, Mezokovesd, Martirok u. 25. Hungario.

*La jenaj bulgaraj esp-istoj dez. kor. kun ĉl kaj interŝ. bk. kaj fotojn:

F-ino Borjana Tjurkiĝieva, Lernantino, Bjala, str. "Ŝipka" 6.

F-ino Veneta Iv. Bojkova, Pleven, str. G. Dimitrov 93.

F-ino Liljana Mineva, Ruse, Konservkombinato "Dunavia".

F-ino Anka Sinabova, Bjala, str. V. Levski, 5.

S-ino Roza Dimitrova, str. Gurko 43. Ruse.

*Esperanto Klaso, 30 geknaboj 10 jaraĝaj dez. kor. kun samaĝaj gekolegoj el tutmondo, interŝ. bg., leterojn, fotojn infanliteraturon, ktp. Al Dimitr Ivanov, Ruse, str. "Vardar", Bulgario.

LA E-GRUPOJ KAJ SENPAGAJ EKZEMPLEROJ — Sur la lasta paĝo de n-ro 5, 1964 de EPĈ aperis nia anonco tiutema. Sed nun estas ankoraŭ grupoj, kiuj ne respondis la demandojn. Ni devas atentigi ilin, ke la tempo urĝiĝas. Ne lasu nin vane atendi. Ankaŭ la aliaj E-grupoj kiuj deziras ricevi tiajn senpagajn ekzemplerojn tuj skribu al ni laŭ la anonco.

ANKORAŬ MANKAS VIA VOĈO — Multaj el niaj legantoj jam resendis al ni la enket-liston kiun ni ekspedis kune kun n-ro 5, 1964. Kaj la memorigaj donacetoj

al ili estis jam forsenditaj. Nun ni petas vin legantojn ankoraŭ silentajn, ke ankaŭ vi nin helpu per viaj opinioj kaj proponoj.

BEDAŬRINDE — Iuj el niaj legantoj plendis, ke certa n-ro de EPĈ ne venis en iliajn manojn, kredeble pro perdiĝo survoje. Tio ja estas perdo ankaŭ por la redakcio. Kion oni povas fari por eviti tian bedaŭrindaĵon? Volonte ni konsolus niajn kun-suferantojn per reekspedo de la gazeto. Sed ofte ni povas nur peti kompreneman pardonon de ili pro elĉerpigo de la stoko. Bedaŭrinde!



ENIGMO

KIAL?

Iun tagon, la fanfaronema leporo sin laŭdis: "Miaj oreloj estas plej sentemaj kaj kapablas aŭdi sonon eĉ de kilometrojn fore, pri tio ĉi neniu povas kompari kun mi."

Tion aŭdinte lokusto diris malaprobe: "Kiel viaj oreloj povus sin kompari kun la miaj?"

Serpento elŝovis sian kapon el la kaŝejo kaj diris: "Miaj oreloj estas la plej sentemaj!"

Orioleto pepis sur arbo: "Kial disputi? Prefere vi komparu vin unu kun alia!"

Kiel kompari? La lokusto proponis la unua: "Ni ŝtopu la orelojn kaj vidu kiu povas aŭdi."

La oriolo vindis la kapon de la leporo per lotusfolio, tiun de serpento per bambufolio kaj tiun de lokusto per arbofolio. Poste ĝi kantis sur la arbo: "Same stultaj tri azenoj. Kiel vi povas aŭdi kun kovritaj oreloj!"


La leporo diris kapskuante: "Tro mallaŭte! Mi ne povas aŭdi!" Sed la serpento kaj lokusto aŭdis la vortojn de la oriolo kaj ilin ripetis tute korekte. La oriolo diris: "La serpento kaj lokusto havas la plej sentemajn orelojn."

La leporo malkonsentis dirante ke la oriolo ne bone vindis iliajn kapojn. Ĝi bone vindis la kapojn de la serpento kaj la lokusto inkluzive iliajn buŝojn kaj okulojn.

La oriolo refoje kantis: "Mirindaĵo, mirindaĵo, kapabla aŭdi en vindaĵo!" Tiun ĉi fojon la serpento nur skuadi la kapon, sed la lokusto ankoraŭ povis aŭdi kaj ripetiti la vortojn korekte.

Karaj gelegantoj, bonvole diveni kio estas la kaŭzo?

(PREMIO: Tiu, kiu la unua el sia lando sendos al ni ĝustan solvon, ricevos de ni la serion de il. pk. "Pentraĵoj de Ki Bajŝi.")



Ne Tiel Bona Kiel la Via

Instruisto: "Kiam mi estis en via aĝo, mi povis reciti parkere ĉion kion la instruisto lernigis, kaj ne esis tiel malsaĝa kiel vi."

Lernanto: "Ĉar mia instruisto ne estas tiel bona kiel la via. Se li min instruas, mi lernus certe pli bone ol vi."

Sorĉskribaĵo

Iam en la malnova Ĉinio estis taoisto kiu asertis ke li posedas supernaturan povon kaj lia sorĉskribaĵo estas efika por ĉio.

Iu petis lian helpon por forigi moskitojn kaj ricevis sorĉskribaĵon. Li algluis ĝin sur la muron de sia ĉambro, sed ĝi tute ne efikis kaj moskitoj svarmis en la vespero kiel antaŭe. Li plendis al la taoisto. Tiu ĉi montris miron kaj diris post vizito al lia domo: "A! Vi misuzis ĝin! Oni devas ĝin alglui interne de moskitovualo."

KOREKTO
al la ALDONO de
El Popola Ĉinio
(n-ro 6, 1964)

P. 1, L. 26 demalsupre. La lastan frazon legu jene: Ĉinio estas devigita fari nuklean provon kaj disvolvi nukleajn armilojn.



萬山紅遍層林盡染
正色紅於五月
可公手注化

